



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Junio 2020 n-ro: 54



Merhaba,

Korona virüsünden dolayı insanlar evde kaldıkça çevreye verdiğimiz zarar da gittikçe azalıyor. Mesela hava o derece temizlendi ki, İstanbul'dan kuş uçuşu 105 km uzaktaki Uludağ bu kadar net olarak görülebiliyor (fotoğrafi çeken bir arkadaşımız).

Bu sayımızda da sizlere dünyanın her bir tarafından ve birbirinden ilginç yazılar, hikayeler, masallar, şiirler, fıkralar, bulmacalar, ve Esperanto dünyasından haberler derledik.

Sizler de korona virüsünden sakınmak ve bu problemden bir an önce kurtulmak için evde kalın ve dergimizin sayfalarını çevirerek, sunduğumuz metinlere bir göz atın.

Bu metinleri deşifre edip anlamaya çalışarak dili öğrenmekte olan abonelerimiz dil seviyelerini geliştirebileceklerdir.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

Pro la kronviruso homoj restas hejme kaj tiel ankaŭ la malutileco ni kaŭzas al nia ĉirkaŭaĵo malmultiĝas. Ekzemple la atmosfero tiom puriĝis, ke Uludag monto, kiu troviĝas en distanco de 105 km for de Istanbulo komencis vidiĝi tiom klare (la foton faris amiko nia).


Ankaŭ en ĉi tiu numero ni kolektis por vi tekstojn, rakontojn, fabelojn, poemojn, krucvortenigojn, ŝercojn, kaj novaĵojn de Esperantujo el la tuta mondo.

Por sekurigi vian sanon kaj tiel kontribui al la solvo de ĉi tiu grava monda problemo restu hejme kaj trafoliumu nian revuon por trarigardi la diversajn tekstojn prezentitajn de ni.

Provante deĉifri la tekstojn por kompreni ilin, niaj abonantoj, kiuj ankoraŭ lernas la lingvon povos altigi siajn lingvonivelejn.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Kunfarejo	4
Amikoj seriozaj malmultas	4
Tempo Sigelita	5
PROMETEO – DEŬKALIONO (ΠΡΟΜΗΘΕΥΣ – ΔΕΥΚΑΛΙΩΝ)	6
Unuaj renkontiĝoj kun Esperanto	9
La naŭ instruistinoj el Parnaso	10
La Kimero - Rakonto el la estonteco (1)	12
Astrologio kontraŭ Psikologio-Junio/Ĝemeluloj	12
Amikeco inter hundo kaj kato	14
La feliĉo de ĉi mondo	14
Ŝercoj	16
Kurcvortenigmo	16
El la libro de "Dao de Jing" (45)	17
Blogo de najbaro	17
Franco KAFKO (Franz Kafka)	18
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	20
Bruligu la vian tutan diskaron!	21
Fringelo kaj Kolombo	21
Amuza Matematiko	21
Nepo Tim kun Virkato Murkel	22
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	22
Neatendita Revido	23
Ozimandias (Ozymandias)	24
La Bubo	25
Poemo de Alfred Grech	26
Forpasis Eduardo Larrouy, la dojeno de nia movado	26
Tragedio pro la atombomboj (parto 7)	27
Nova stelo sur esperanta ĉielo	28
Ekde la naŭa (Απ' τες εννιά)	29
Kiel estiĝis la preskaŭ 6000 lingvoj de la mondo?	30
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

La lukto inter
Davidoj kaj Goljato -
olda edifo.
Forto aŭ kuraĝo? Ja
Respond' en la legendoj



Rostita pano
en japana urbo. Ja,
delikataĵo.



Estis fiŝoj... Sed,
finis ilian vivon
en restoraci'...
La "mutaj" fiŝoj kriis.
Sataj kontentaj homoj...



Buked' nedaŭra
odoras en la vazo.
La vivo finis.
La belec' nur en bildoj
por ĉiam nin ĝojigas.



verkis kaj sendis **Elena Popova** el
Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La maja Sumoo finiĝis kun sukceso. Al ĝi partoprenis 324 homoj el 37 landoj. La nombro de partoprenantoj en la Sumoo ekde septembro 2009 estas 12.225. Granda atingo!

En julio ni okazigos la 64-an Sumoon, kvankam antaue mi anoncis, ke en julio sumoo ne okazos. Ĉiuj Esperanto-eventoj estis nuligitaj. En tiu situacio nia sumoo povas okazi kaj devas okazi por Esperanto-movado. La julia Sumoo okazos ekde la 12-a de julio ĝis la 26-a de julio. Varbu konatojn kaj sukcesigu ĝin.

Analizo

1. Partoprenantoj: 324 el 37 landoj
2. La nombro de partoprenantoj ekde septembro 2009 ĝis nun estas 12.225 homoj (2009.9-2020.5)
3. Laŭlandaj nombroj :
 - 1. Japanio: 64
 - 2. Brazilo, Francio: 36
 - 4. Ĉinio: 31 (
 - 5. Pollando: 20
 - 6. Rusio: 17
 - 7. Germanio: 16
 - 8. Britujo: 12
 - Italio: 12
 - 10. Vjetnamio: 9
 - ...
 - 28. Turkio: 1
 - ...
4. Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 300 el 324 (92,59%)
5. Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 20.000 paĝoj (Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo)

UEA



N-ro 875 (2020-05-21)
Oficiala anonco de Monda Festivalo kaj Virtuala Kongreso de Esperanto 2020

UEA oficiale anoncas, ke okazos Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) kaj en ĝia kadro Virtuala Kongreso (VK). [...]

N-ro 874 (2020-05-18)

Alvoko de UEA por solidareco al esperantistoj en Uvira, D. R. Kongo, per Espero

En momento dum kiu la tuta homaro suferas pro la koronavirusa pandemio, Uvira, urbo nordoriente de DR Kongo, estis trafita de terura natura katastrofo [...]

N-ro 873 (2020-05-16)

Mesaĝo de TEO kaj UEA okaze de la Internacia Tago de Teo, 21 majo 2020

La 21-a de majo estas deklarita de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Tago de Teo. Post akvo la plej ofte uzata trinkaĵo en la mondo estas teo. [...]

N-ro 872 (2020-05-15)

Nova estraro de Instituto Hodler

La Estraro de UEA en marto 2020 renovigis la estraron de Instituto Hodler '68. En ĝi nun troviĝas: sino Ans Bakker-ten Hagen, Nederlando (prezidanto); [...]

N-ro 871 (2020-05-14)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj, 15 majo 2020

La Internacia Tago de Familioj, la 15-a de majo, estas okazo por rekoni la gravecon de la familio kiel la baza unuo de socio. Ĉi-jare la Tago alprenas specialan signifon dum la mondo frontas la eksplodon de KOVIM-19. [...]

TEJO



Kontribuu al video pri kronviruso kaj universitata vivo

Kontribuu al la kvara epizodo de Esperantistoj kaj kronviruso! La limdato por sendi vian videon estas la 25-a de majo.

Kiel la kronvirusa pandemio influas la universitatan vivon?

La temo de la epizodo estas: Kiel la kronvirusa pandemio influas la universitatan vivon?

Kiel la kronviruso influis la semestron?

Ĉu la semestro entute okazis? Ĉu estis ŝanĝoj?

Faru videon kaj rakontu al ni! [...]

Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2020-2021)

Kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. [...]

Iĝu TEJO-estrarano 2020/21

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn por la Estraro de TEJO, por oficperiodo ekde la 1-a de septembro 2020 ĝis la 31-a de aŭgusto 2021. La Estraro estas la ĉefa plenuma instanco de TEJO.

Ordinare, novaj estraranoj estas elektitaj okaze de la ĉefa kunveno de la Komitato dum la Internacia Junulara Kongreso, kiu ĉi-jare okazos speciale rete de la 11-a ĝis la 19-a de julio 2020. [...]



Leteroj de niaj legantoj



Karaj, verŝajne mi forgesis skribi, ke mian tradukon el la belega poemo de Gyula Juhász (Kia estis) mi sendis al vi nepre ne por publikigo. Ĝi estas primitiva, laŭvorta kaj mi hontas antaŭ la hungaraj legantoj, kiuj konas la originalon. Kvazaŭ mi estus kopiinta delikatan punkton en ligno. Pardonu min, se mi ne avertis vin antaŭe, ke tiun tradukon mi ne sendis por publiki ĝin.

Lenke Szász el Hungario



Koran dankon ankaŭ je la nomo de Ilir Zhiti. Turka Stelo reprezentas por mi, pro ties ideoriĉa enhavo kaj tutampleksa kontribuanto, digna informilo tiel gloran civilizan centron, la eksan Kostantinopolon aŭ Novan Romion, kiu siatempe eklipsigis la ceteran mondon. En Albanio ĝis antaŭ unu jarcento, oni ĉiam aludis tiun urbegon luksan kosmopolitan kiam oni parolis pri io belega, perfekta, magia, kultura kaj scienca, same kiel

pli frue tion oni diris pri Bagdado.

Mi ĝojas, ke ekde kelkaj jaroj tiun esperanto lanternon starigis vi kun viaj amikoj.

Ne nur futbalo diskonigas la famon de iu lando!

Gratulojn! Plenestime,

Bardhyl Selimi el Albanio



Karaj,

La revuo Turka Stelo tute ne estas amatora, sed interesa, alloga kaj modela por multaj aliaj! Eventuale pli da unueco en la tiparo povus kontribui al la kvalito, sed krome, ĝi estas ege bona!

Por subteni, mi sendas soneton kiun mi tradukis antaŭ nelonge. Mi esperas ke ĝi plaĉas al vi.

Kore salutas,

Lode Van de Velde el Belgio

Kunfarejo



Esperanta Kunfarejo
kunfarejo.frali.bplaced.net

malapero de Esperanto. Tial Frank kreis retejojn kiel per.esocom.de, maklerejo.de, kiuj malaperis sen perdo de anoncetoj. Ili nun estas ĉi tie kaj atendas la uzon de plej eble

Simple kunfaru!

Frank informas pri la 'Esperanta Kunfarejo'.

Kabe diris: "Mi opinias, ke Esperanton plej necese devas lerni la Esperantistoj mem!" Frank Merla opinias, ke Esperanto estos pli alloga por lernintoj kaj lernontoj, se la publiko vidas homojn fari ion komune malgraŭ militoj, limoj, supozoj pri

multaj esperantoj.

Unu eta indiko: Ĉiuj anoncetoj por 'Kunfarejo' estas prezentitaj en la lingvo Esperanto.

<http://kunfarejo.frali.bplaced.net>

-- informas **Klaus Friese** el Germanio

Amikoj seriozaj malmultas

sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Oni diras, ke amikoj seriozaj malmultas. Laŭ rakonto popola albana: La filo fanfaronis antaŭ sia patro dirante, ke li havas jam multajn amikojn dum la patro ne. - Ĉu viaj amikoj estas veraj? - demandis la patro. - Provu ilin! Invitu ĉi vesperon por helpi vin kaŝi la kadavron de homo ĵus mortigita de vi. La filo petis plurajn el siaj amikoj veni helpi lin tiucele. Ĉiuj petis pardonon, ke ili ne povus, jen ĉar la fileto malsanas, jen ke la virino ege bezonas lin, jen.. Tiam la patro diris al sia filo inviti sian unusolan amikon. Vespere la amiko de patro eniris la hejmon

senpacience:

- Kie estas la kadavro, ni tuj forportu ĝin!
- Ne hastu, mia amiko, respondis la patro. Bonvolu vespermanĝi kun ni! Kaj en la manĝejo la amiko vidis surprize bone rostitan virŝafon!
- Tio estis la kialo, klarigis la patro.



PARAJANOV – AŜIK GARIP kaj SAJAT NOVA

“Mia naŭa filmo estis ‘Ombroj de la forgesitaj prapatroj’ (1964). Jen tiam mi trovis mian kernan lokon, mian areon de intereso: la problemoj, kiujn travivas homoj. Mi koncentriĝis sur etnografio, Dio, amo kaj tragedio. Kaj literaturo kaj kino estas vere tiuj aferoj por mi.”

Sergei Parajanov

“Kiam li ekkomencis filmi en Ukrainio li kredis je kino de socia realismo, je kino kiu postkuras la videblan. Tempo montris al li, ke ni vivas en pli profunda, kalkulata, multtavola mondo. Li do kreis kinon, kiun nutris historio, fabeloj, popolarakontoj, mitologio.”

Riza Ojлум

Fabeleco kaj poezieco, granato, rizo, miniaturo, polifoniaj kaj monofoniaj muzikoj, popoldancoj kaj baletaj movoj, blankaj kolomboj, kokinoj, amo kaj disiĝo, kuniĝo, senparolantaj kaj pantomimaj aktoroj, rakontistaj voĉoj en la fono, tapiŝoj kaj dekoracioj, kungluaĵoj, vizaĝoj similaj al miniaturoj, kiuj ornamas malnovajn librojn...



Ĉu eblas priskribi la kinarton de Parajanov? lomete malfacila afero. Ĉar tiel, kiel estas skribita en la enkonduko de ‘Sajat Nova’ (1969, Koloro de Granatoj): “Ĉi tiu filmo tute ne zorgas priskribi la veran vivrakonton de bardo.” Parajanov tute ne provas “rakontadi” pere de la kutimaj metodoj ankaŭ en sia filmo “Aŝik Garip” (1988, ĝi estas azerbajĝana turka popolarakonto kiu havas kelkajn diversajn versiojn). Tiu filmo lasis spurojn en mia memoro pro ĝia miniaturo vidiĝo kaj la karikaturaj mimikoj de la aktoroj. Ĝi estas la lasta filmo, kiun kompletigis Parajanov kaj dediĉis al Andrej Tarkovski, kiu apogis

lin kontraŭ cenzuro.

“En 1989, kiam Parajanov venis al Istanbulo kadre de la Istanbula Film-festivalo, li diris : se mi ne sentos min tiom maljuna, mi eble povos filmi la popolarakonton ‘Lejla kaj Meĝnun’ kaj ankaŭ ‘Ferhat kaj Ŝirin’ de Nazim Hikmet (Nazim Hikmet reverkis tiun popolarakonton en formon de teatraĵo). Tamen lia vivdaŭro ne permesis lin plenumi tiun promeson. Post la filmado de ‘Aŝik Garip’ li diris ‘Mi tiun filmon tre amas. Ĉiu artisto devas scii kiam li mortos. Mi volas morti post ĉi tiu filmo.’ Kaj post du jaroj li forpasis”¹

Mi provos rakonti la vivon de la direktoro pere de la stilo de tiuj du filmoj:

Sarkis. Sergei. Naskiĝis en Tbiliso. Armeno. Kartvelo. Soveto. Ruso. Homo. Infano, kiu ŝatis flugi, salti, kuri en sia rev-mondo. Eĉ se li kreskis, li restis infano. Violonisto, kantisto, dancisto, poeto, pentristo, kostumisto, scenaristo, direktoro. Tbiliso, paŝoj al muzika mondo. Moskvo, metilernanto en filmo-kosmo. Nigjar, Nigjar, Nigjar... amara glutpeco, amara memoro. Lia unua edzino. Islama, tatarino. Ĉar ŝi edziniĝis al li, ŝia familio mortigis ŝin. Ukrainio, la unuaj dokumentaj filmoj, la unuaj filmprovoj. Sergei, knabo kiu ne taŭgas al sia ujo. La antikvaĵeco de lia patro kaj liaj antikvaĵoj, ĉio en lia rev-mondo. Mugoĵ, tasoj, skatoloj, tapiŝoj, tapiŝaj ornamoj, tapiŝaj ornamoj, tapiŝaj ornamoj... En lia kamerao, kiu malmulte moviĝas, kaptiĝas aĵoj kaj artistoj kiuj vikle moviĝas. Teatra mondo. Vi amas Ŝahsenem (Magul Megeri). Vi iris kun via patro kaj fratino. Vi malriĉulo, kiu amas filinon de riĉulo. Vi estas pelita eksteren. Mono, mono, mono... la mondo signifas monon. Ekiru al 1001-taga vojaĝo! Via amatino preĝas en islama preĝejo. Inklinita konstruaĵo, ŝajne ĝi estas la turo de Pizo! Ortodoksaj pastroj en la malantaŭo... ‘Sazo’ (azerbajĝana popolmuzika instrumento), malĝojaj voĉoj, ĝojaj voĉoj. Rivero. Malbona viro Hurŝid ruzis kontraŭ vi. Vi plonĝis en la rivero, li forkaptis vian vestaĵojn! Hurŝit montris ilin al via patrino, ŝi blindiĝis! La ruĝa granato nigriĝis, via patrino ekfunebriĝis. Blankaj kolomboj, blankaj vestoj, blankaj rizoj, blankaj lekantoj; pureco. La maljuna bardo konfidis sian ‘sazon’, la kutimoj daŭris de mano al mano. lutage Sankta Georgo alvenis sur sia blanka ĉevalo, donis al vi pecon de grundo pere de la piedo de sia ĉevalo. Ŝmiru ĝin sur la okuloj de via patrino li diris, por ke ŝiaj okuloj eliru el malheleco! Vi poste kuniĝis kun via amatino kaj atingis la pinton de feliĉo. Blankaj kolomboj, blankaj retŝtofoj, vualoj... Ne ĉiam la >>15



En la tre malnovaj tempoj, en tiuj tempoj kiujn la homa intelekto ne povas atingi, okazis la granda milito inter la nekonscieblaj fortoj de la naturo, milito de nepensebla sovaĝeco, kies fina venkinto estis la bono, personigita de la granda dio de la dioj, Zeŭso (Ζεὺς). Ciklopoj, Gigantoj, Titanoj, ĉiuj teruraj kontraŭuloj estis venkitaj kaj sur la tero, sur la tuta universo estis starigita la povo de la granda, eterna Mastro!



Inter la protagonistoj de tiu milito estis kazuveka figuro, Prometeo.

Prometeo estis filo de Titano, tamen, en la daŭro de la kruela titanbatalo li staris ĉe la flanko de Zeŭso. En la komenco, obeante al konsilo de sia brila patrino, Gea (Γαῖα), li klopodis konvinki la Titanojn cedi, almenaŭ ne rekte kontraŭstari al la Olimpaj dioj, dirinte, ke en tia milito la forto ne sufiĉas, ke la venkon alportos la menso, la spirito, la ruzoj, la artifiko. Li proponis al ili siajn proprajn planojn, per kiuj ili povas venki Zeŭson, tamen la arogantaj Titanoj opiniis ke ilia forto sufiĉas, ke ili bezonas nenion pluan. Post tio, la saĝa Prometeo helpis Zeŭson, kiel ties konsilanto

Kiam la povo de Zeŭso kaj de la Olimpaj dioj estis starigita, la dioj kunvenis kaj la dimastro disdonis al ili honorojn kaj taskojn, al ĉiu el ili apartan regkamon, laŭ ĉies deziroj, intereso kaj inklinoj. La dioj zorgis pri ĉiu kreitaĵo, pri ĉiu viva kaj neviva estaĵo, tamen Zeŭso klare montris sian antipation kontraŭ la homa genro.

En tiuj tempoj la homoj havis nenian scion, ili povis prilabori nenion, ili vivis en truoj de la tero kiel la formikoj, ili ne havis rezonkapablon, logikon, ili vivtenis sin obeante al la instinkto de memkonservado, do ili estis kondukataj al certa perejo. Malgraŭ tio, Zeŭso ne maltrankviliĝis, li sciis, ke li povas, kiam ajn li volas, estigi novan homaron. Tute male, Prometeo amis multe la homojn, li estis tute certa, ke post taŭga gvidado kaj instruado, tiu specio povas iĝi konkeranto de la tuta tero, mastro de ĉiuj vivantaj estaĵoj kaj ĉefa

intereso de la dioj. Li aŭdacis kontraŭstari al la granda dio, li pledis por la homoj, li petis pri ties protektado, tamen vane, la mastro de la mondo ne konvinkiĝis. Tiam, Prometeo faris la nepenseblaĵon, li ŝtelis la fajron, tenatan en la dia restadejo, en la laborejo de la dio Hefesto (Ἡφαίστος), kaj kaŝe li donacis ĝin al la homoj. Tio tute ŝanĝis la situacion sur la tero. La vivo



de la homoj draste ŝanĝiĝis, tuj pliboniĝis kaj Prometeo vidis, ke liaj esperoj kaj deziroj praviĝas, kaj kiam la unua aliformiĝo de liaj amataj estaĵoj plenumiĝis, lia entuziasmo puŝis lin fari ankoraŭ pli multon; li tute forgesis la ordonojn de Zeŭso, li mem aliris al la homoj, li montris al ili kiel ili povas uzi la malsovaĝajn bestojn, kiel ili povas protekti sin kontraŭ la sovaĝaj, li instruis kiel ili povas prilabori la teron, kulturi la kampojn, kolekti la fruktojn, ĉasi, fiŝkapti, konstrui domojn, fari instrumentojn, distingi kaj kolekti la taŭgajn kuracherbojn, sin protekti kontraŭ la danĝeraj naturaj fenomenoj, kontraŭ ĉia malfacilaĵo kaj danĝero.

La aliformiĝo de la homoj estis impresa, tio entuziasmigis kaj kuraĝigis ankoraŭ pli multe Prometeon, kiu iris pli malproksimen, li instruis al la homoj la literojn kaj la numerojn, la artojn kaj la sciencojn, li montris al ili la movon de la steloj, la ŝanĝiĝon de la epokoj, la kaŝitajn en la tero utilaĵojn, la kupron, la feron, la arĝenton; en la efektiveco, Prometeo iĝis la vera kreinto de la homoj! Ĉu kreinto, ĉu bonfaranto, Prometeo iĝis la amata heroo de la homoj kaj ankaŭ tio kaŭzis al li suferojn.

Zeŭso ĉion scias, ĉion vidas kaj ĉion povas. Do, supozeble, li bone sciis, ke Prometeo trompis lin longe, ke li ignoris lin, ke li arogis malobei kaj ofendi lin. Kial, do, li lasis lin plenumi sian agadon? La homoj, kiuj neniam dubis pri la absoluta saĝeco kaj logiko de la patro de la dioj, diradis, ke ankaŭ li scivolis ekscii kiom foren povas iri la homa inteligenteco kaj kapablo.

Tamen, tio havas nenian signifon, ĉar Prometeo estis juĝita de la dioj kaj laŭ fina decido de Zeŭso li estis kondamnita al tre severa, ekstrema puno, li estis katenita al paliso, sur la supro de Kaŭkazo, en la fora orienta ekstremaĵo de la mondo, kaj ĉiutage grandkorpa aglo ŝin ĵetis sur lin kaj voris lian hepaton. La sekvantan tagon la hepato rekreiĝis kaj denove la aglo ĝin formanĝis. Estis turmentado terura, senĉesa, kiu daŭris tre longe; la multe pli postaj homoj diradis, ke estis tempo egala al tridek nunaj jaroj. Kaj estis

Heraklo (Ηρακλής), la duondio, la plej granda heroo de ĉiuj epokoj, tiu, kiu, pasante de tiuj foraj lokoj, ekvidis la kondamnitajn bonfaranton de la homaro en akra mizero. Forte ŝokis lin la terura turmentado de la bonkora Prometeo, do, senhezite li ekpafis sian sagon sur la aglon, li mortigis ĝin kaj liberigis Prometeon.

Kompreneble, ankaŭ tion vidis la ĉiopova Zeŭso, tamen li ne reagis, li lasis sian filon fari tion, kion li opiniis ĝusta, kaj rilate al tio, la homoj diradis, ke Zeuso estis jam pentinta pri sia tiom rigora pundeĉo, tamen la granda dio ne povus konfesi sian eraron, simple ĉar la dioj de ĉiuj epokoj neniam eraras! Estis, do Heraklo, tiu kiu donis solvon kaj metis finon al la maljusta kaj malagrabla situacio, en kiun estis enfalinta, precipe lia patro mem.

Tiel, Prometeo vivis libera, ĉiam starante apud la homoj, kiujn li tiom multe amis. Kvankam mortema, post lia liberigo li estis invitita de Zeŭso vivi egalrajte kun la dioj de Olimpo (Όλυμπος), en la dia restadejo, kie li helpis ĉiujn per siaj saĝaj konsiloj. Kaj estis ankoraŭfoje Heraklo, kiu oferis, tiun fojon neintence, duan, ankoraŭ pli valoran donacon al Prometeo.

Heraklo estis tre bona amiko kun Kirono (Χείρων), kaj tiu Kirono estis unu el la centaŭroj, la konataj ĉevalviroj, estaĵoj kun homa brusto kaj ĉevala korpo. Kirono estis treege saĝa, oni diradis ke li estis la sola persono, kiu sciis ĉion, aŭ preskaŭ ĉion. Kaj tio estas eble troaĵo, tamen estas tute certe, ke Kirono estis instruisto de multaj dioj kaj brilaj herooj pri diversaj sciencoj, ke, interalie, li estis la unua en la mondo medicinisto, tiu kiu instruis la kuracarton eĉ al Asklepio (Ασκληπίος) mem, la dio de la medicino.

Unu tagon, Heraklo, dezirante eviti kelkajn malamikajn centaŭrojn, kiuj persekutis lin, rifuĝis en la restadejo de sia amiko Kirono. Kiam la malamikoj sekvis lin en tiu loko, ne tre vasta kaverno, Heraklo devige alfrontis ilin per sia terura klabo kaj per sia granda pafarko. Okazis kruela batalo en mallarĝa loko, dum kiu Heraklo pafis kontraŭulon per sago, kiu estis tiel forte ĵetita, ke ĝi trapikis la malamikon kaj vundis la femuron de Kirono, kiu staris apude. Eĉ tre malgranda pikvundo kaŭzita de sago de Heraklo estis mortiga, ĉar liaj sagoj estis venenitaj per la sango de la terura naukapa serpenta monstro Hidro (Ύδρα), de la lago Lerno (Λέρνη), unu el la monstroj mortigitaj de la granda heroo.

Kirono estis senmorta, li ne mortis, li suferis, li daŭre, senĉese suferis doloron neelteneblan. Li ne povis morti, do li devis elteni tiun nigran destinon en la eterneco. Tiele lia senmorteco, la donita al li plej granda dia donaco, iĝis plej severa puno. La amatan al ĉiuj dioj centaŭron neniu povis helpi. La plej grandaj dioj kunvenis, ili pristudis atente la aferon kaj ili

decidis, por la unua kaj por la lasta fojo, la nekrediblaĵon, depreni de Kirono la



senmorteco. Post tio, la amata al ĉiuj granda majstro mortis, elliberiĝis.

Tamen, la problemo ne estis tute solvita, ĉar la senmorteco de Kirono ne povus perdiĝi, ĝi devus esti donata al alia, al mortema estaĵo. La dioj denove kunvenis kaj post nelonga diskutado, ĉiuj konfesis ke en la diaj restadejoj, inter ili, estas al ĉiuj amata kaj de ĉiuj favorata kvazaŭdio, titanido, tamen mortema. Kompreneble ĉiuj pensis pri Prometeo, la nejuste pritraktita homama heroo, al kiu finfine estis oferita la senmorteco deprenita de Kirono. La amata centaŭro, post la morto juste restis senmorta en la pensoj de dioj kaj homoj, krome li iĝis stelo, kiu en la eterno fiere staras sur la ĉielo. Prometeo, post la fino de sia surtera vivo, iris al Elizeo (Ηλύσια Πεδία), kie li ĝuas la eternan, plenan feliĉon, kune kun la duondioj, la grandaj herooj, la virtuloj kaj justuloj de la mondo.

Ŝajnas, tamen, ke la amataj estaĵoj de Prometeo ne tute meritis ties sinoferon kaj senliman amon. La homoj lernis multon, ili akiris logikon kaj rezonkapablon, sed post kiam la sendita de Zeŭso al la tero unua homino, Pandora (Πανδώρα), alportis al la homaro la diajn donacojn, bonaĵojn kaj malbonaĵojn, la homoj facilanime akceptis ĉion. Post nelonge malbonaĵoj, miskomprenoj, ĵaluzo, antipatio, malamo, regis super granda parto de la homaro, venis disputoj, konfliktoj, kvereloj, malamo, interbataloj, militoj, la homoj disiĝis en divers-grandaj grupoj, iom-post-iome ili komencis perdi la brilon donitan al ili de Prometeo.

Prometeo havis filon, Deŭkalionon, al kiu li estis transdoninta sian amon por la homaro. Tiu Deŭkaliono havis la karakterizaĵojn de sia patro, li havis la samajn meritojn, moralon, virtojn, valorojn, krome, ili estis tre pia, li vivis inter la homoj, li estis tiu, kiu instruis al ili kiel ili devas montri sian dankemon kaj respekton al la dioj, kiel adori ilin, kiel starigi sanktejojn kaj altarojn. Krome li montris al ili kiel ili povas konstrui kaj organizi komunumojn kaj hejmojn. Li faris ĉion kion li povis, por savi la homan specion, li senlace laboris por instali la harmonion en la mondo, por disvastigi la bonajn principojn, kaj per tiu lia agado li gajnis la estimon kaj amon de la dioj, precipe de la dimastro. Fakte, Zeŭso



havis altan opinion pri la bona agado de Deŭkaliono kaj de ties edzino Pira (Πύρρα), sed li konstatis ke la klopodoj de la

bonkora paro estas vana. La homoj fariĝis ĉiam pli kaj pli malbonaj, ili sin okupis precipe pri senfinaj malkonsentoj. La homoj preferis la militon, la unuj deziris la pereon de la aliaj.

Iam, Zeŭso, ne plu povante toleri la tian homan konduton, decidis tute pereigi la homan specion per kataklismo. Kiam la decido estis ricevita, Prometeo alvokis sian filon kaj sciigis al li la fatalan verdikton, la nepre okazontan ekstermadon de la tuta homaro. Deŭkaliono estis ordinara mortemulo, li vivis inter la homoj, do, li deziris havi la saman kun ili sorton. Tamen, Prometeo povis ankoraŭ esperi kaj pensi pri homa estonteco, li, do, ĉiaforte klopodis konvinki sian filon savi sin, kaj malgraŭ tio, ke tia tasko estis tre malfacila, fine li sukcesis lin konvinki.

Deŭkaliono, laŭ la konsiloj kaj indikoj de sia patro, konstruis grandan lignan keston, ian arkeon imunan kontraŭ la akvo, en kiu li metis sufiĉan kvanton da necesaj provizoj kaj kiam la pluvo komencis fali, li kaj lia edzino Pira enfermiĝis en ĝi. La pluvo falis abunde, torente, senĉese. La ordonoj de Zeŭso estis konkretaj kaj definitivaj, do, la riveroj kaj la lagoj pleniĝis, ili ŝvelis, ili superfluis, la akvo fortiris, dronigis ĉion vivantan kaj ne vivantan, ĝi kovris la kampojn, poste la altaĵojn, la montetojn, la pli malaltajn montojn. Estis diluvo, estis kataklismo, kiu daŭris naŭ plenajn tagnoktojn. En la arkeo Deŭkaliono kaj Pira, en vera, neeltenebla malespero kaj malfeliĉo, atendis la finon, ili povis nenion vidi, nenion aŭdi, ili nur komprenis, ke ilia ŝirmejo flosas sur sovaĝaj ondoj. Ili ne povis pensi pri la ebla rezulto de tiu puno, pri ties ebla efiko sur la mondo, sur la amata al ili homaro. Iam, la moviĝo de la kesto ĉesis, regis trankvilo kaj sereno. Deŭkaliono malfermis la pordon, li eliris kaj vidis ke ilia ŝirmejo staris sur ebenaĵo de monta supro. Estis supro de la granda helena monto, la amata al la dio Apolono (Απόλλων) Parnaso (Παρνασσός). Ĉio kion la okuloj povis kapti, estis kovrita de akvo kaj nur montaj elstaraĵoj estis sekaj. En tiuj altaj lokoj estis birdoj, estis bestoj, estis ĉiaj estaĵoj, tamen homoj ne estis!

Deŭkaliono kaj Pira komencis plori per pezaj

larmoj pri sia perdita mondo, sed ili ne forgesis sian devon al Zeŭso, do, tuj kiam ili staris sur la tero, ekbruligis fajron kaj pie sanktoferis al la dia patro, ili preĝis kaj varme dankis la dion kies decidojn ili ne povis pridubi. Zeŭso kontentiĝis, li plezuriĝis tiom multe, ke, plej probable voĉe, li prezentis sin al la piaj geedzoj kaj demandis kion ili deziras ke li donu al ili. Deŭkaliono kaj Pira varme, unuvoĉe petis de la dio homojn, nur homojn kaj Zeŭso estis kortuŝita li ne povis rifuzi al ili la favoron. Li donis al ili instrukciojn kaj Deŭkaliono kaj Pira, kovris per iu vesto sian vizaĝon kaj komencis sentime marŝi antaŭen. Tie, kien ili paŝis, la akvo detiriĝis kaj la geedzoj prenis de sur la tero ŝtonojn kaj ĵetis ilin malantaŭ si. Ĉiu ŝtono ĵetita de Deŭkaliono aliformiĝis en viron, kaj ĉiu ŝtono ĵetita de Pira, aliformiĝis en virinon. La bonkoraj geedzoj senlace piediradis longan tempon, tiel, ke la akvoj tute detiriĝis, ke la mondo denove pleniĝis de homoj. Tiel, elvenis la nova homaro, la nia homaro, kiu ĝis nun estas kaj ĉiam estos.

La antikvaj mitoj iam finiĝis, la homa fantazio elĉerpiĝis, la malnovaj dioj malaperis kaj la novaj ĉiam amas kaj protektas la homojn. Tamen, en la plej foraj tempoj de la perditaj mondoj la savantoj kaj protektantoj ne estis la dioj, estis Prometeo kaj Deŭkaliono, la mitaj herooj, kiuj ĉiam meritas eĉ la dankemon de la nuntempaj homoj.

Notinde, ke la unua filo de Deŭkaliono, unu el la multaj ties idoj, estis Heleno (Ελλην), la gentopatro de la Helenoj. Tiel, la antikvaj Helenoj ĉiam honoris siajn unuajn prapatrojn. Prometeo kaj Deŭkaliono estis adorataj kiel dioj, la homoj honore al ili fondis altarojn, sanktejojn, diversajn adorejojn. Oni eĉ diradis, ke Deŭkaliono estas tiu kiu starigis la plej brilan sanktejon de la Olimpa Zeŭso (Ολυμπίου Διός) en Ateno (Αθήνα), de la sanktejo kies restaĵoj staras ankoraŭ ĝis nun en centra loko de la helena ĉefurbo. En Ateno, ĉiujare, omaĝe al la granda bonfaranto de la homoj, okazis granda festo nomata Prometeoj (Προμήθεια), dum kiu, interalie, estis organizita atleta kurado de torĉoportantaj junuloj. La partoprenantoj, tenante brulantan torĉon trakturadis la tutan urbon kaj venkinto estis tiu, kiu la unua atingis la finpunkton, kun la torĉo brulanta. Tiele oni simbolis la grandan oferon de Prometeo al la homaro, la oferon de la fajro.

Estas kompreneble ke la herooj de tiu ĉi rakontado iĝis objektoj de ĉiaspeca alt-nivela artkreado kaj tiale ili restos eterne vivaj en la homa penso.

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de la bildoj, de Kostas Kiriakos)



Diversaj homoj alvenas al Esperanto laŭ diversaj vojoj kaj mi dezirus rakonti al vi pri miaj unuaj renkontiĝoj kun la internacia lingvo, kiuj ne estis tute ordinara.

Ho, la fora infaneco! Kia bela kaj alloga, ornamita per fabelaj koloroj estas la infana mondo. Mia kara patrino, elirinta en la pli belan mondon antaŭ multaj jaroj, instruis min legi, kiam mi ankoraŭ ne estis eĉ plene kvinjara kaj mi estis absorbigita per la la mirinda mondo de libraj fabeloj kaj rakontoj. Iom poste el mia patro mi eksciis, ke ekzistas ia mistera lingvo, kies nomon li ne sciis, sed per kiu homoj de diversaj naciecoj povas komunikadi. Kiel interese tio aperis al mi! Mi pensis, ke se mi konus ĉi-tiun lingvon, mi povus legi la fabelojn de la tuta mondo! Kaj ankaŭ mia patro sciigis min ke tiun lingvon konas la vilaĝa fotografiisto Aleksandras Ŝarva.

Mi iomete flankeniĝos de la rekta rakontado por diri kelkajn vortojn pri sinjoro Ŝarva. En sia juneco li studis en pedagogia seminario por ekesti instruisto, tamen li ekmalanis pri tuberkulozo. Li ne tute saniĝis, tamen kvankam lia malsano ne estis plu infekta, li ne povis labori en lernejo, do li ekestis fotografiisto. Li estis edukita kaj klera persono, havanta vastan mondkoncepton kaj la plej grava fakto estis, ke li estis esperantisto.

Do, unufoje mia familio iris al li por esti fotitaj. Mi klare memoras, ke dum tiu vizito mi unufoje ekaŭdis la belsonan vorton Esperanto. Mi ankaŭ memoras, ke tiufoje la fotisto iomete propagandis la lingvon al miaj gepatroj, elparolante kelkajn vortojn kaj propoziciojn, montrante la simplecon kaj belsonecon de la lingvo. Do tiu estis la unua fojo, kiam mi ekaŭdis pri nia kara lingvo, sed mi ne entreprenis ian ajn pli seriozan studadon de ĝi. Ja, mi estis, mi opinias, nur sepjaraĝa tiam.

Mia pli serioza ekinteresiĝo pri la lingvo, okazinta kelkaj jaroj pli malfrue, estas laŭ mi ne tute ordinara. Kvankam sinjoro Ŝarva ne organizadis iajn-ajn kursojn de Esperanto, li, estante homo pedagogiema, ŝatis komunikadi kun infanoj kaj multaj infanoj de nia vilaĝo ofte vizitadis lin en lia hejmo. Tie ili akiradis iom da konoj pri la internacia lingvo. Bedaŭrinde, mi, kiel iomete sinfermema infano, ne frekventadis al li. Tamen poste la cirkonstancoj turnis sin tiel, ke mi ekestis la plej sindona vizitgasto de ĉi-esperantisto.

Kiel, do, tio okazis? Mi ree devas iomete deflankiĝi kaj priskribi kelkajn cirkonstancojn antaŭ ol daŭrigi mian rakonton. Mia hejmvilaĝo estis sufiĉe granda - kun lernejo, preĝejo, malsanulejo kaj kelkaj stratoj. Fakte ĝi estis kvazaŭ malgranda urbeto. En

mia strato loĝis tre bela knabino kun tre belsona nomo por mi - Judita. Ŝi estis iomete pli aĝa ol mi, sed inter ni aperis ia proksimeco. Loĝante sur la sama strato ni ofte bonŝancis iri al la lernejo kune. Estis tre agrable paroli kun ŝi kaj el ŝi mi ekkonis, ke ŝi frekventadas al sinjoro Ŝarva kaj ke ŝi iomete interesiĝas pri Esperanto. Ŝi, same kiel mi, estis interesiĝinta pri libroj kaj iafoje diris al mi, ke ŝi estas leginta tre interesan libron, kiun ŝi povus liveri al mi. Ho, mi ĝoje akceptis ŝian proponon. Kia litovlingva libro tio estis, mi jam ne memoras, tamen kion mi neniam forgesos, estis vortoj de Judita, kiam ŝi diris, ke mi estu atenta kaj ne elĵetu el la libro malgrandan folieton kaj aldonis, ke mi rigardu al ĝi nur kiam mi venos hejmen. Mi estis ekintriginta. Kia, do, folieto? Kial mi ne rigardu al ĝi tuj? Mi venis hejmen kaj tuj malfermis la libron, en kiu antaŭ la unua paĝo estis malgranda kunfaldita paperfolio. Mi disfaldigis ĝin kaj ekvidis ses vortojn en nekonata lingvo. La vortoj estis: "Vi estas afabla. Mi amas vin". Komprenoble, mi tuj konjektis, ke tio estas Esperanto kaj la radiko "am-" ŝajnis implikanta ion al mi. Sekvontmatene, renkontinte Judita'n survoje al la lernejo, mi demandis ŝin pri la signifo de la mesaĝeto, tamen ŝi koketeme ridis kaj diris: "Penu kompreni. Se vi iros al sinjoro Ŝarva kaj ekinteresiĝos pri Esperanto, vi tuj komprenos ĉion."

La saman tagon mi estis gasto de sinjoro Ŝarva. Mi ekdemandis lin pri Esperanto kaj li volonte rakontis al mi pri la lingvo, pri sia internacia korespondado, kiu dum soveta tempo ŝajnis kvazaŭ miraklo, montris al mi multajn librojn, revuojn kaj ĵurnalojn en la lingvo internacia. Tiufoje, vidante, ke mi estas serioze interesiĝinta, li donis al mi du libretojn, lernilojn de Esperanto kun ambaŭdirektaj Esperanto-litovaj vortaretoj. Komprenoble, mia unua plej granda lernostimulo estis elsencigi la mesaĝeton de Judita. Post la interparolo kun la estimata sinjoro Ŝarva mi haste kuregis hejmen por realigi mian unuan internacilingvan strebon. La vortaro konfirmis miajn antaŭsentojn. Mi tiam estis nur 12-jaraĝa, tamen mi memoras, ke mia koro ekbatis forte, kiel la koro de la plenaĝa enamiĝinto.

El la perspektivo de preskaŭ kvindek jaroj mi vidas ke post tio mia amikeco kun Judita ekestis pli proksima kaj bela, liveranta al ni ambaŭ purajn, brilajn sentojn. Ni ofte renkontiĝadis, vintre kune skiadis, frekventadis la vilaĝan kinejon kaj lerneajn dancojn kaj eĉ iam kisadis. Angloj havas bonan vortkunmetaĵon pri la unua amo - "calf's love" ("bovida

amo”). Nia bovda amo estis tre bela kaj neniam forgesebla. Ĝi daŭris ĝis kiam mi estis 15jara. Poste Judita forveturis ien malproksimen de mia vilaĝo, ŝanĝis la lernejon kaj nia unua amo ĉesis.

Tamen postrestis Esperanto. Mi ege ekinteresiĝis pri ĝi kaj mi ekestis ofta frekventanto de sinjoro Ŝarva. Kun lia helpo kaj subteno mi dum mallonga tempo ellernis la lingvon. Mia unua libreto, legita en Esperanto estis “Japanaj rakontoj”, eldonita komence de la pasinta jarcento per la eldonejo “Berlin Esperanto Verlag Möller & Borel”. Mi estis ege feliĉa, kiam post multaj jaroj mia ĉeĥa korespondamiko donacis al mi ĉi-libreton, kiun mi ege valoras ĝis nun. Sinjoro Ŝarva ankaŭ donis al mi por legi aliajn librojn, la ĵurnalojn “El popola Ĉinio”, “Hungara vivo”, “Bulgara esperantisto”, “Geografia revuo”, “Norda stelo” kaj aliajn. Li helpis al mi ekkorespondadi kaj anonci mian adreson en E-ĵurnaloj. Mi korespondadis kun samideanoj el preskaŭ ĉiuj tiamaĵ “socialismaj” landoj kaj ankaŭ mi skribadis leterojn en Aŭstralio, Iranon, Vjetnamion, Ĉinion kaj eble aliajn forajn landojn. En la fermita kaj severe kontrolata tiama soveta socio ebleco komunikadi kun eksterlando por mi estis vera miraklo. Eĉ mi, juna knabo, komprenis, ke mia

korespondado estas kontrolata. Ekzemple, el Aŭstralio mi ricevadis leterojn, kiuj estis ĉirkaŭgluitaj per plastikaj gluzonetoj. Tamen mi sentis, ke eĉ en tiaj cirkonstancoj mi estis pli libera ol multego de aliaj miaj samaĝuloj.

Mi jam menciis, ke mi estas iomete sinfermema homo, tial min neniam allogis diversaj ĉeestaj Esperantaj aranĝoj, mi por ĉiam restis pasiva, letera esperantisto. Nuntempe mi nomus min virtuala esperantisto. Tamen mi ĉiam konsciis kaj ĉiam konscios, ke la kreaĵo de Ludoviko Zamenhof estis unu el la plej geniaj inventoj de la homaro.

Rigardante malantaŭen mi kun respekta danko memoras modestan, tamen sindonan esperantiston Aleksandras Ŝarva, kiu helpis al mi iri laŭ la vojo de internacia amikeco. Mi estas dankema al mia unua amo, kiu donacis al mi Esperanton kaj mi estas dankema al Esperanto, kiu pribeligis mian unuan amon kaj mian tutan vivon.

Dankon pro via firmeco legi ĉi longan mian konfeson.

verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio

La naŭ instruistinoj el Parnaso

(Scienc-fikcia rakonto laŭ grekaj antikvaj legendoj)

ANTAŬ TRE LONGE

Antaŭ miloj da jaroj, kiam la historio de la homaro apenaŭ komenciĝis, la Teron vizitis aliplanedanoj, kiuj similis homojn. Iliaj korpoj estis ĉiam junaj kaj belaj, krom kiam ili intence volis igi sin aspekti kiel abomenindaj monstroj, por timigi la homojn. Ili nek maljuniĝis, nek malsaniĝis, nek sentis fizikajn dolorojn. Ili kapablis vojaĝi facile kaj rapide inter planedoj kaj galaksioj. En ilia komunumo, la nivelo de la scienco estis miloble pli alta ol la iama nivelo de la antikvaj homoj sur la Tero. El multaj vidpunktoj, iliaj sciencaj konoj kaj ilia teknologio ege surpasis eĉ niatempan kulturon. Iliaj karakteroj similis tiujn de la teranoj. Do, tiuj aliplanedanoj kapablis mensogi, envii, avari, ekkoleri, kalumnii, ŝteli, murdi ktp. Sed ili kapablis ankaŭ ami, kompati, entuziasmiĝi pri io bela, malavari, sincere amikumi, helpi, teni siajn promesojn ktp. La rilatoj inter tiuj aliplanedanoj kaj la antikvaj teranoj estis tre diversaj. La aliplanedanoj ofte uzis hipnozon, kiel metodon por influi homajn sentojn, pensojn kaj agadojn. Ŝajnas ke tamen ili ne povis uzi la saman metodon por influi unuj la aliajn, do ene de ilia komunumo aperis oftaj konfliktoj. Iliaj hipnoz-influoj estis kelkfoje bonefikaj, aliffoje malbonefikaj por la koncernaj homoj. La aliplanedanoj kapablis fariĝi

verkis kaj sendis Luiza Carol el Israelo

nevideblaj per la homaj okuloj, kiam ajn ili deziris. Ili ankaŭ kapablis aliformiĝi en aliajn estaĵojn por atingi siajn celojn.

Ŝajnas ke nun, tiuj aliplanedanoj ne plu troviĝas sur la tero. Oni ne scias, ĉu ili forlasis nian planedon definitive. Eble parto el ili revenos aŭ jam revenis. Luj supozas, ke ili eĉ ne foriris, sed decidis kaŝi sin pro diversaj kialoj... Cirkulas centoj da rakontoj pri tiuj aliplanedanoj kaj miloj da supozoj. La antikvaj homoj nomis ilin “dioj” kaj “diinoj” kaj dediĉis al ili belajn templojn, el kiuj multaj daŭre konserviĝas.

LA NAŬOPO

Ĉi tie mi rakontos pri tre famaj antikvaj aliplanedanaj instruistinoj, kiuj laŭ onidiroj loĝis antaŭ tre longe sur la greka montaro Parnaso. Ili estis naŭ fratinoj, tre talentaj kaj sentemaj. Ili klopodis instrui al la antikvaj teranoj diversajn artojn kaj sciencojn, por ke la vivo sur la Tero fariĝu pli bela kaj la homoj fariĝu pli sentemaj. Ili iniciatis individuajn lecionojn kaj elektis siajn lernantojn laŭ kriterioj kiujn la homoj nek konis nek povis influi. Neniu lernanto estis invitita viziti ilin ĉe ilia mistera montara loĝejo. La fratinoj mem decidis kiun kaj kiam viziti. Ilian propran metodon de instruado oni nomis “inspiro”, kaj la naŭ instruistinojn oni nomis ankaŭ “inspiristinoj” aŭ “muzoj”.





La patro de la inspiristinoj estis Zeŭso, la ege potenca reĝo kiu regnis super la diaro kaj la homaro. La patrino de la inspiristinoj oni nomis Mnemozino (“La Memoriga”), ĉar ŝi scipovis signife influi la memorkapablojn.

La naŭ fratinoj nek kapablis nek deziris “inspiri” iun ajn kontraŭ ties volo. Fakte la homoj plej ofte petegis la favoron fariĝi iliaj lernantoj, sed nur malmultajn ili akceptis. Ĉiu ajn el la naŭ inspiristinoj havis siajn apartajn talentojn, siajn proprajn kompetentojn kaj siajn prioritatajn spertojn. Laŭ tiuj specifaj spertoj, ili dividis inter si specifajn pedagogiajn taskojn. Ili ĉiam kunlaboris tre efike, tial ili fariĝis brila imitinda ekzemplo de harmonia teama laboro.

ERATO, POLIMNIO kaj KALIOPO

La naŭ inspiristinoj bone konsciis pri la graveco de poezio koncerne la evoluon de la homa spirito. Tial, tri el ili elektis instrui poezion. Tiuj klopodis igi la homojn esprimi sin klare kaj bele. Kiam oni klopodas esprimi sin pere de vortoj, la pensoj pliprofondiĝas kaj la emocioj nuanciĝas. Tio signifas, ke la poeziema triopo multe helpis la homaron maturiĝi.

Unu el tiuj inspiristinoj ŝatis instrui pri verkado de ampoemoj, tial oni nomis ŝin Erato (“La Aminda”). Alia inspiris la homojn verki himnojn pri vivoĝojo kaj danko al la dioj, tial oni nomis ŝin Polimnio (“La Himnara”). Alia inspiristino, kiun oni nomis Kaliopo (“La Belvoĉa”) pro ŝia ĉarma voĉo, kutimis instrui pri eposoj rilatantaj al heroecaj agoj kaj al filozofio.

Iom post iom, la lernantoj de Erato, Polimnio kaj Kaliopo komencis esprimi sin ne nur pere de versoj, sed ankaŭ pere de artecaj prozaĵoj. Pere de ĉiuj literaturaj ĝenroj (poemoj, rakontoj, teatraĵoj, eseoj) la homoj kutimiĝis imagi paralelan mondon, pli interesan kaj sencoplenan ol la reala. Tio instigis ilin doni sencon al siaj propraj vivoj kaj riĉigi siajn vivospertojn. Verkante kaj legante beletraĵojn, la homoj komencis ankaŭ filozofumi.

Multaj lernantoj de Erato, Polimnio kaj Kaliopo kutimiĝis ankaŭ pentri aŭ skulpti siajn mensajn imagojn. Iuj aliformis siajn ampoemojn en pentraĵojn

aŭ skulptaĵojn pri siaj amatoj aŭ amatinoj. Aliaj aliformis siajn himnojn dediĉitajn al la potencaj dioj de la tero, la suno, la akvo kaj la aero en pentraĵojn kaj skulptaĵojn pri belegaj pejzaĵoj, bestoj, floroj aŭ fruktoj, ofte en pentritajn aŭ skulptitajn portretojn pri la dioj mem. Aliaj artistoj ilustris famajn rakontojn pri realaj aŭ imagaj eventoj. La tri inspiristinoj konsideris ĉiujn pentraĵojn kaj skulptaĵojn kiel

videblajn kaj tuŝeblajn poemojn kaj prifieris inspiri ilin.

Oni deklamis aŭ kantis ampoemojn kaj eposojn dum geedziĝ-festenoj. Tiam oni ĝuis belaspektajn frandaĵojn kaj bonodorantajn trinkaĵojn, kiuj bonhumorigis la festantojn kaj helpis ilin fariĝi pli kaj pli kreemaj. La gastigantoj preparis tiujn festenojn pacience, entuziasme kaj kun granda amo, por plezurigi la novajn geedzojn kaj la gastojn. Erato kaj Kaliopo konsideris tiujn artecajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kiel videblajn, tuŝeblajn, flareblajn kaj gustumebajn ampoemojn kaj eposojn. Dum tradiciaj religiaj festoj, oni pensis pri la potencaj dioj kapablaj helpi aŭ malhelpi la vivon de la homoj. La vortoj de la himnoj esprimis la homan deziron pri bona vetero, pri bona rikolto kaj pri sano. La kortuŝaj preĝoj kaj dankesprimoj okazis ĉirkaŭ bele dekoraciitaj tabloj plenaj je bongustaj bonodorantaj manĝaĵoj. Kaj tiuj frandaĵoj fariĝis ĉiujare pli kaj pli evoluitaj. La homoj kuiris pli kaj pli bonguste kaj samtempe pli kaj pli sanige, plibonigis multajn speciojn de fruktoj kaj legomoj, elpensis novajn receptojn... Tiamaniere, la homoj bone konsciis pri la sankta energio kiun oni ricevas de la tero, suno, akvo kaj aero.

Polimnio konsideris tiujn artecajn frandaĵojn kiel videblajn, tuŝeblajn, flareblajn kaj gustumebajn danko-himnojn, dediĉitajn al la dioj de la tero, de la suno, de la akvo kaj de la aero. Ŝi estis fiera ke ŝi inspiris ilin.

Iom post iom, la poemeca pensmaniero komencis integriĝi en la ĉiutagan vivon de la homaro.

Sed, kiam Zeŭso observis la agadojn de Erato, Polimnio kaj Kaliopo, lia frunto sulkiĝis pro maltrankvilo...

(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Luiza Carol** el Israelo

Antaŭparolo



similecoj kun vivantaj homoj aŭ aktualaj aferoj estas tute hazardaj.

La sonĝo

La plej malbona evidente ĉesis. Malproksimiĝis la fulmotondro, kiu sendis la lastajn mallaŭtajn tondretojn. Ankaŭ la torenta pluvo malpliĝis. Verdire idealaj kondiĉoj por la nokta ripozo. Sed estis

ĉiam ankoraŭ vere tro varme kaj humide en la ĉambro. Sven rapide malfermis la fenestron sed tuj poste denove fermis ĝin. Nun venis la kuloj. „Kial mi ne muntis la dratan kulvualon dum la lasta semajno?“, li pensis. Bedaŭrinde nun estis tro malfrue. Li estis laca. Tial li bezonis multajn komencojn por venki la monstron. Tute elĉerpate li falis sur la liton.

Dum ekdormo lin daŭre sekvis la zumanta brueto de la insekto, kvankam li tute certis, ke ĝi estis transportita en la kuloĉielon. Jes, nun li povis certiĝi. Malantaŭ blanka, dika nubo memstare malfermiĝis pordo, la eliro al la kuloĉielo. Super vasta herbejo ŝvebis gigantaj svarmoj da kuloj. „Ĉi tie mi estas“, allogis lin milda voĉo kaj Sven pensis, ke li rekonis 'sian' ĵus mortigitan kulon. Ĝi ŝajne ne konservis

koleron, sed dance partoprenis kune kun la aliaj la ascendantan kulokirlon. Kolektiĝis milionoj da insektoj.

Meze de la herbejo troviĝis granda muro, minimume dek metrojn alta. Ĉi tie prezentiĝis la aktualaj novaĵoj. „Tion mi jam konas“, murmuretis Sven, ĉar antaŭ la ekdormo li ĵus spektis la lastajn mesaĝojn. Nun en sonĝo sin ripetis la raporto pri la japana esplorprojekto por kiu la naskiĝo de kimero el homo kaj besto unuafoje estis permesita en la jaro 2019. Temis pri la kulturado de anstataŭigaj organoj por homoj.

Sur la mura ekrano nun aperis unu post la alia ĉiuj ajn homaj organoj, apude en granda formato la vizaĝoj de rikanantaj ratoj, porkoj kaj hundoj. Sven sin turnis en la lito de unu flanko al la alia kaj ĝemis. Nun la kapo de la anoncistino pli kaj pli ŝanĝiĝis. Unue malaperis la konturoj kaj la bildo iĝis ŝancelfuŝita, poste la buŝo transformiĝis al beko. La bela hararo estis anstataŭigita per giganta cerva kornaro. La anoncistino nun ne plu svingis la brakojn. Longaj tentakloj, same kiel tiuj de polpo, transprenis la movojn.

Sven ŝvittrempite leviĝis kaj sidiĝis sur la rando de la lito. La sonĝaj bildoj plue videblis. Tian sonĝon li neniam antaŭe travivis. Li ne konsciis, ke spekti novaĵsendaĵon antaŭ la dormo povus havi tian efikon. Antaŭtagmeze li estis informinta sin pri la studo de bioteknologio. Estis klare ke li bezonis rakonti pri tiu sonĝo al la kunstudentoj. Sed kiel Sven nun povis kvietiĝi?

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

Astrologio kontraŭ Psikologio - Junio / Ĝemeluloj



Laŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « ĝemeluloj »

* Virinoj :

Korpo kaj sano

Ŝi longtempe pluhavas aspekton junecan, konservinte flekseblan figuron kaj vespecan talion. Fajntajta, ofte beleta, ofte triagula vizaĝo kaj vigla

rigardo, ŝi tamen mankas je "vera" virineco, kaj viroj ne taksas ŝin «seksaloga». Ili taksas al ŝi personecon kaj spriton, kvakam tiun ili malpli aprezas kiam ili estis ties viktimoj; Ŝi ne povas malhelpi esti agresema, atakante eĉ kiam oni ne riproĉis ion ajn. Estas malpli da malsameco inter viroj kaj virinoj de tiu signo, tiagrade, ke ili havas aspekton de maturiĝanto dubseksa.

Ŝia sano dependas de sia nerva ekvilibro, kaj psika. Ĝis kiam ŝi ne havas problemojn, korinklinaj aŭ alifontaj, ŝi ĝuas solidan sanon, konstante en movo, ni eĉ diru agito, parolema kaj ridema. Kiam «ne glatas», ŝi suferas pri ĉiaj malbonfartaĵoj, kiuj gamas de migreno al virinaj malsanoj, tusado aŭ kio ajn. Temas antaŭ ĉio havi alibion por pravigi malbonhumoro kaj agresemon.

Urbon kaj ties distraĵojn ŝi ŝatas, maldormaj noktoj, alkoholo, tabako ktp, ekscita vivo, kiu plaĉas al ŝi, sed kiun ŝi ne povas vivadi sendanĝere. Ŝi do ankaŭ bezonas malstrĉiĝon, naturon kaj meditado.

Kiel ŝi reagis?

Kaprica, abrupte ŝanĝigema, ŝi havas malfacilecon je homkontaktoj, spite ŝian grandan deziron al komunikado. Ŝi ankaŭ iom tro montras sian malestimon, kaj faras neniom da klopodoj por komprenigi sin. Tamen, kaj tie ŝi estas emociiga, ŝi translasas la naivecon kaj infanecon en ŝia naturo, sian maltrankvilon de maturiĝanto. Ŝi ne konscias je la aflikto kiun ŝi ŝi foje rezultigas «ili nur ne prenu ĝin malbone!» ...

La maltrankvilecon kaj timon, kiun ŝia konduto naskas, estas mem maltrankviligon al ŝi kaj ŝi ĝin repuŝas. Ŝi respektas nur tiuj, kiuj kontraŭstaras je ŝi per pli fortika volemo aŭ per senemocia sinteno, ŝi estas trankviligitaj tiam, kiam oni rifuzas sin lasi insidi per ŝia «ludo»; la malvirta cirklo kiun ĝi estigas tiam ĉesas turniĝi.

Je kio ŝi taŭgas?

Ili scipovas elserĉi, ek trovi kontaktulojn, sonorigi al pordoj, ĉefe kiam siaj rektaj interesoj ne estas la temo. Ili fariĝas bonajn gazetistojn, raportistojn, kinoskriptojn. Ili intersiĝas pri spektakloj, verkas kun facileco, estas kapablaj interpretistoj aŭ traduktoj. Ili adaptiĝas al ĉiaj profesioj fakte. Ili estas tiom bonaj kelnerinoj, rapidaj kaj multmemoraj, kiom negocistinoj kapablaj lukti kontraŭ viroj plej kompetentaj.

Kiel ŝi amas?

Finfine, ŝi ja dezirus havi korinklinan vivon tian, kian tiuj de la aliaj, kondiĉe ke ŝi ne enuu kun la de ŝi alektita kunulo. Sed ŝi havas karakteron malfacilan, venĝeman, kaj povas rompi per ekimpulso, ne volinte, ke oni reale preni ŝin laŭvorte. Ŝi ne havas fidosenton, kaj ankaŭ pardonas al aliaj la mispaŝojn, kiujn ŝi

pardonas al si, kondiĉe ke oni ne kore ŝin perfidu, kaj tiun dubsencecon igas aferoj foje tre komplikaj.

Ŝi amas propramaniere, kun ĉarmo kaj abrupteco, "gravaj aferoj ne bezonas esti diritaj".

Ŝi facile konsentas eksedziĝon, adaptiĝante tiom bone je soleco kiom je nova kunulo, kaj opinias, ke la infanoj ĉion komprenemas, kondiĉe ke oni klarigita al ili kun simplamaniere. Cetere ili ŝi edukas bone, respektante iliajn personecojn kaj ne troprotektante ilin.

*** Viroj :**

Korpo kaj sano

La ĝemelulo estas maldika, svelta, supla, vangoj longaj kaj iom kavecaj, alta frunto, maldika nazo, ĉio movemas en tiu vizaĝo, precipe la okluloj.. Li estas lerta kaj malestimas la plumpulojn. Li emas mienas mokema, rideto kroĉita je l'lipoj.

Li estas nervozulo, kies elteneco kapricas. En la farta tereno, kiel an la aliaj li estas neantaŭvidebla.

Tamen li ĵonglas sufiĉe bone kun kun siaj fortoj, kaj havas rapidan reboniĝemon.

Kiel li reagis?

Por kompreni la ĝemelulon, signo malsimpla plej, necesas kompreni lian duoblecon. Ludado aŭspicias liajn agoj kaj reagojn. Li nenion akceptas kiel tragika, kaj adaptiĝas verve je ĉiuj cikonstancoj, ne lasante sin ĝenadi per neniu. Li senbalastigas sin sen konscienciproĉo je tiuj, kiuj havis la albonan ideon tedi lin aŭ malhelpi eĉ iomete en sia vivo. Se necese li uzos intelektan malhoneston kaj malveremon.

Iom da oportunismo ne timigas lin, li defendas kun lerto siajn interesojn, kaj se oni riproĉas al li lian egoismon, li elturniĝas per ŝerco. Li povas ŝangi pri vero laŭ la momento aŭ la humoro. Li ne domaĝas sian proksimulojn, opiniante, ke ili nur sciu sin defendi, kaj «ne estu kompato al la lamaj anasoj» Ĝemeluloj batas vin per senĝene krudajn batojn, ne problemante montriĝi poste dorlote ĉarmaj. Foje oni incitiĝas de la memcerta tranĉa tono eĉ fiaplombo per kiu ili asertas ion ajn. Sed ili kapablas iom da tempo poste bonvole konsenti pri sia malpraveco... kondiĉe ke oni metis al ili «la nazon el sia propran merdon».

Ili diratas malstabilaj kaj supraĵaj, sed eble estas rimedo por sin defendi, kaj ili kliniĝas antaŭ inteligento al ili supera. Ilia malstabileco estas eble nur rifuzo aniĝi al la gregon de la komunaj homoj, kiun ili emas malestimi.

Je kio li taŭgas?

La ĝemelulo preskaŭ sentas bezonon konduki du agadojn samtempe, krom se ili povas ĝui pri profesio tre «movema». Estas unu el la kialoj, kiu klarigas ke

oni trovas inter ili makleristojn, gazetistojn, ktp. Inteligenta, parolante kun lerto kaj facileco, brile uzanta la paradoksojn, lertaj je «envolvi» diplomate homojn, ili prosperos en la profesioj, kie oni devas uzi la plumon aŭ la langon, en politiko, verkado. Kiel profesoroj ili lasos memoron mirigitan al siaj studintoj... almenaŭ al la plej inteligentaj inter ili. Oni evitu preni serioze lian cinikismon kaj provokemon, estus naiva kaj danĝera kaptilo.

Tie estas du ĉefaj specoj da ĝemeluloj : unu estas pli artista, sed malbone kunfrontas realecon, la alia estas pli ruzega, oportunisma kaj elturniĝema.

Amikeco inter hundo kaj kato

Per tiu parolo oni esprimas la malon de la amikeco, kaj oni eĉ kredas, ke inter hundo kaj kato ne povas ekzisti amikeco, bona rilato. La pli granda, pli forta besto, la hundo malamas kaj persekutas la – kompare kun li – etan kaj malfortan katon. Eble tio okazas, kiam temas pri senmastraj strathundoj kaj katoj, se ili renkontiĝas.

Mi vidas ĉiutage multajn ĉarmajn fotojn aperigitajn en Facebook kun hundoj kaj katoj en plej bela amikeco. La granda kaj forta hundo protektas la etan kaj malfortan katon, eĉ mamnutras katidojn. Kiel tio povas okazi?

Mi kredas, ke tiuj bestoj havas saĝajn kaj bonkorajn mastrojn, kiu nutras ilin kaj malpermesas al la hundo peli, persekuti la katon. Ili ambaŭ apartenas al la sama bona mastro kaj al kutimiĝas harmonie kunvivi.

Kiam mi vidas foton pri hundino mamnutranta katidojn, mi komprenas, ke temas pri la ĉion venkanta patrino instinkto, bela kaj kortuŝa. Sed mi ne pri tio volas paroli ĉi tie.

Kiel li amas?

Li amindumas kun senĝeneco, ĉarmo kaj senzorgeco. «Ĉu vi volas? Ne? Tiom malbone por vi!» Ne estas pli komplika. Esenca estas singardi de la pasio.

Li estas nek ĵaluza, nek posedema, kaj rigardas monstreca voli gardi virinon por si nur. Li mensogas kun memcerto, aŭ eldiras brutalajn verojn. Kaj kio estas vero unu tagon iĝas mensogo la postan. Li cetere neos : «Mi ? Neniam mi diris tion!»...

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

verkis kaj sendis Lenke Szász el Rumanio

Se temas pri homoj, nacioj ni vidas naciojn, inter kiuj estas tiel nomata „hundo-kato – amikeco”: La pli forta persekutas la malfortulon, forprenas lian grundon, malpliigas liajn vivkondiĉojn. Kial?



Mi pensas, ke homo devus esti pli saĝa ol besto, la „mastroj” de la popoloj devus regadi saĝe kaj juste. Ili devus instrui al la diversnacioj kunvivi en paco, protekti kaj ne persekuti la malfortulon.

Jen kion instruas al ni la bestoj.

verkis kaj sendis **Lenke Szász** el Rumanio



La feliĉo de ĉi mondo

tradukis kaj sendis Lode Van de Velde el Belgio



Tiu ĉi soneto estas verkita en la franca lingvo de Christoffel Plantijn (1520-1589) kies presejo en ĝia apogeo estis la plej granda de Eŭropo. Li do naskiĝis antaŭ ekzakte 500 jaroj! Malgraŭ tio, la ĉi-suba soneto estas sentempa!

La feliĉo de ĉi mondo

Havi domon komfortan, puran, belan,
Ĝardenon kun bonodoraj spaliroj,
Bongustan vinon, ne tro da servistoj,
Nek infanbruon, sed edzinon fidelan.

Vivi sen ŝuldoj, kokro aŭ kverelo,
Ne dividi kun parencoj heredon,
Facile kontenti, ne bezoni pledon,
Aranĝi ĉiujn planojn laŭ modelo.

Vivi kun rezervo, sen ambicio,
Sindoni senskrupule al devoto,
Bridi kaj obeigi siajn pasiojn.

Havi firman juĝon, trankvilan animon,
Deklami la rozarion, flegi la greftojn,
Estas pace atendi ĉe si la morton.



tradukis kaj sendis **Lode Van de Velde** el Belgio

5 >> rakontoj finiĝas feliĉe, sed en ĉi tiu rakonto estas espero. Lermontov (Mikhail) aŭskultis ĉi tiun rakonton de iu, kaj mi ĝin legis de la poeto, do mi ĝin elverŝis al filmkvadratoj. Se la rakonto de Sergei restos en via menso, ĝi tiam elversiĝos en diversaj formoj el via buŝo.

Sajat Nova

Parajanov vi iam diris: “La plej bona filmo estas tiu farita por surduloj kaj mutuloj. Ni parolas troe, estas



tro da vortoj. Tio, kion mi intencas, estas trovi la puran belecon, kiu preterpasas paroladon.”

Jen, vi trovis ĝin, pentrante la vivon de bardo Sajat Nova. Via filmo estas ŝajne irana skatolo, kies ekstero estas ornamita kun detaloj sed ĝia interno estas pli riĉa ol ĝia ekstero. Folioj kaj volumoj de la Sankta Biblio, libroj, monaĥoj, infaneco. Malĝoja vizaĝo de patro, patrino kun radianta vizaĝo. Monaĥoj, roboj, sonoj de sonoriloj... Fiŝo, kokoj, granatoj... Arcimboldo (Giuseppe) aŭ Bosch (Hieronymus) salutas tiujn kvadratojn. Kaj vi Sarkis Parajanov estas same al Sajat Nova (la ĉasisto de kantoj). Vi naskiĝis en Kartvelio kaj knediĝis kun kaŭkaza kulturo. Vi estas kaj armeno, kaj kartvelo, kaj ruso, kaj azerbajĝano, kaj perso. Vi superis la lingvojn... vi mem kreis lingvon. La lingvon de okuloj. Via filmo, komencas per granata sangofarbado de blankaj ŝtofoj. Granatoj en la armena kulturo signifas abundeco, fekundeco. En iu sceno la monaĥoj manĝas granatojn kun apetito. Piedo premas vinberojn. La piedoj de monaĥoj produktas vinon. Oni eligas oleon el olivoj. La sango de la oferita kokino, kiun oni ŝmiras sur la frunto de infano, sangoruĝa kresto... Aktorino simila al pentraĵo, kun grandaj okuloj, kun blanka vizaĝo, kiu estas ambaŭ viro kaj virino. Li alivestiĝas kvinfoje. Monaĥejo ŝajne miniaturo. Akcepta ceremonio. Kristo. Vi, kiu flanke etendiĝas viajn brakojn... brakojn senvestajn... Ŝafoj, kiuj plenigas la monaĥejon dum la entombigo de la patriarko. Ŝafoj, kiuj rememorigas Kriston dirantan “Mi estas bona ŝafisto, bona ŝafisto ofertas sin pro siaj ŝafoj”... Harutjun (Sajat Nova) ŝajne

priskribo de Kristo. Nigra-blanka. Lumo-mallumo. Pavo, kandeloj, nigra azeno-blanka azeno. Spegulo. Anĝeloj, flugiloj... ‘Kemenĉe’ (muzikinstrumento). Via instrumento pere de kiu vi ludas viajn komponaĵojn.

Aŝik Garip kuniĝis kun sia amatino. Vi estis forpelita de la palaco ĉar vi enamiĝis al la fratino de la reĝo kaj vi mortis sen kuniĝi kun ŝi. La irana ŝtatestro mortigis vin en Hagpat monaĥejo ĉar vi refuzis ŝanĝi vian religion. Ĉi tiu ne estas montrata en la filmo. Ĉar tiu bilda rakonto estas preter la paroloj. Plenplena je figuraĵoj kaj intuicioj...

La jena citaĵo eble diros pli pri la fono de tiuj du filmoj de Parajanov, kiujn mi mem provis rakonti al vi :

“Unue ili estas propraj al la Kaŭkazo, kaj tio signifas akcepti ĉiujn fekundajn kaj abundajn tavolojn de tiu kulturo kaj kompreneble ili estas kartvelaj kaj armenaj, sed samtempe ili baziĝas sur la antikva Grekio, Irano, Osmana imperio kaj Rusio, kaj ekde la jaro 1801, tra la rusaj okupantaj fortoj ili portas eŭropajn kaj okcidentajn trajtojn. Ili formiĝas kaj de la klasikaj literaturaj elementoj, kaj de la muzika bazo, kiu apartenas al la polifoniaj kvartelaj kantoj kaj monofoniaj monotonaj armenaj melodioj pro la tradiciaj muzikinstrumentoj uzataj en la filmoj. Aparte de tio ili portas profundan informon de ĉiuj periodoj kaj stiloj de la pentrado-arto. En liaj filmoj estas citaĵoj de la arto de Velázquez (freskoj de Kievo). En la filmo Aŝik Garip la tuta estetiko venas de la ‘Kaĉar’ pentraĵoj (portretoj de la turkmena dinastio kiu regis en Irano inter la jaroj 1781-1925). Ankaŭ troviĝas skulptitaj obeliskoj de la armenaj preĝejoj sur la Kaĉkar montoj, aŭ freskoj, kiuj ornamis la kvartelajn ortodoksajn



preĝejojn antaŭ ol la rusoj kovris ilin per blanka farbo (en Sajat Nova kaj la Legendo de Suram Kastelo).”²

Parajanov, kiel li vidiĝas en la bildo, estas viro kiu saltadas. Li estas viro, kiu ne taŭgas en la kutimaj ujoj...

subpremoj, malliberejoj, kvankam ne estas komprenata li saltas de ĝojo al ĝojo, de figuro al figuro, de muziko al kino, li saltas, li flugas... La komponisto de la ‘Koloro de Granatoj (Sajat Nova)’

>>>29

Ŝercoj



Antaŭ pli ol cent jaroj, la fama hungara patrioto kaj revoluciulo, Kosuth Lajos faris sian paroladon en la londona "Hide"-Parko. Kiel multaj aliaj volis klarigi siajn pensojn al la publiko, kompreneble, ne hungare sed angle.

Je la fino, aŭskultanto deklaris:

- Mi neniam suspektis ke la hungara lingvo similas al la angla.

Profesia boksisto portas kapveston. Frizisto tranĉante lian haron diras ŝercante:

- Se mi tranĉus vian harligon neniun rekonus vin.

- "Nek vin" ... respondas la boksisto.

- Kial vi petas almozon?

- Ĉar mi volas manĝi, mia sinjoro.

- Kial do vi ne laboras?

- Ĉar kiam mi laboras mi ankoraŭ pli volas manĝi.

Kruko kaj Jozefina konkubas dum multaj jaroj, kaj ĉio glatas. Subite Jozefina, legante romantikan viringazeton, diras:



- Kruko, kial ni ne geedziĝu?

Kruko respondas:

- Ĉu vi frenezas? Kiu volus edziĝi kun vi aŭ mi?

Krucvortenigmo



	1	2	3	4	5	6	7	8
1								
2								
3								
4								
5								
6								
7								
8								

EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 - Libroforma listo de aĉeteblaj objektoj. 2 - Seksa amado. 3 - Speco de hakilo. 4 - Delikata odoro. 5 - Granda speco de mevo. 6 - Lirika poemo. 7 - Japana ludo. 8 - Mallongigo por omo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 - Tuto de skribaj verkoj. 2 - Kompleksa kaj nereala (mat). 3 - Ero de fum-materialo. 4 - Unuformigo. 5 - Orienta du-rada veturilo tirata de viro. 6 - Membrego. 7 - Pezo de pakmaterialo. 8 - Formortinta bovo. 9 - Kemia simbolo de radiumo. 10 - Vokalo.

Fonto: Semajno de Enigmoj #5

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

DUA PARTO - LA VIVO

70



**Miaj vortoj facile kompreneblas,
facile praktikeblas
Sed neniu surtere povas kompreni ilin,
povas agi laŭ ili.
La vortoj havas originon.
La agoj havas mastron.
Ĉar oni ne komprenas ilin,
oni ne komprenas min.
Sed ĝuste je tio, ke mi estas komprenata tiel
malofte,
oni ekkonas mian valoron.
Tial la saĝulo iradas en kruda vesto,
sed ankore li portas juvelon.**

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Sed ĝuste je tio, ke mi estas komprenata tiel malofte,
oni ekkonas mian valoron.“

Laŭ mi la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:
„Tuj, kiuj min komprenas, estas tre malmultaj,
Kaj tiuj, kiuj povas min sekvi, estas apenaŭ troveblaj.“
En la originalo la vorto „ze“ (fonetike) havas kelkajn sencojn,
kaj ĉi tie ĝi signifas „sekvi“, anstataŭ „ekkonas.“

Rimarkoj de Cezar

Kiom da instruistoj jam plendis kiel li? La ŝercema poeto Heine laŭdire staris iam en literaturkluba vespero kun la fama filozofo Hegel en angulo ĉe fenestro kaj diris al Heine: „Iam mi havis lernanton, kiu komprenis min.“ Tiam la granda filozofo silentis dum kelkaj sekundoj kaj poste aldonis: „Sed ankaŭ tiu ne vere komprenis min.“ Miskomprenateco ŝajne estas la neevitebla sorto de grandaj pensuloj. Kaj ankaŭ la plej fama lernanto de Hegel, Karlo Markso, kiu ekzemple moke diris, ke li ne estas marksisto, plendis ofte, ke oni komprenas lin ne ĝuste. Cetere, Hegel estis aĉe pagata instruisto en la prusa universitato en Berlino. Li devis bone kalkuladi por povi vivi de sia salajro. Ankaŭ tion Laocio eble spertis simile, ĉar li evidente vestis sin modeste.

(daŭrigota)

Blogo de najbaro

-- el la blaga blogo

Antaŭ kelkaj jaroj, mi loĝis en impona konstruaĵo kun tre bela enirejo. Meze de la ŝtuparo, ene de nigra fera kradostrukturo, estis bela malnova lifto. La kajuto – el nobla ligno – havis tre komfortan benkon. Mi ĉiam pensis, por kio utilas benko en tia ilo, kiun oni uzas dum tiom mallonga tempo. Sed baldaŭ mi rimarkis, ke ĝi estas utila almenaŭ por iu specifa loĝanto de tiu ĉarma domego.

Tiuepoke mi suferis sendormecon ofte, kaj en tiaj okazoj mi finfine malkovris, ke la plej bona solvo estis trankvile atendi la dormemon sidante sur fotelo, kiu situis en malhela interna ĉambro kun vido al la ŝtuparo. De tie, mi povis kontroli, kiu uzas la lifton en tiuj malfruaj horoj. Ne temis pri tro distra afero, mi devas konfesi, sed mi memoras unu nokton, kiam okazis io speciala:

La najbaro, kiu loĝis, kiel mi, en la plej supra etaĝo, estis drinkemulo, kiu ofte revenis hejmen kvazaŭ dancante surstrate, kiam la lasta trinkejo de nia kvartalo fermiĝis. Ĉi-nokte li eniris la lifton, premis la butonon de sia etaĝo kaj, kiel antaŭvidite, la lifto leviĝis. Sidante sur la benko li endormiĝis tiel profunde, ke, kiam la lifto glate atingis sian celon, li ne vekis. Post kelkaj minutoj, tiu malnova ilo aŭtomate ekreiris al la teretaĝo. Kompreneble, li ankoraŭ



dormis. Tamen, kiam la aŭtomata descenda movo de la lifto finiĝis, estis brueto, kiu vekis la dormulon. Mi supozas, ke la situacio iel surprizis lin kaj li denove premis la butonon de sia etaĝo kaj la afero sizife rekomenciĝis. Nu, mi ne memoras, kiom da fojoj la lifto leviĝis kaj malleviĝis kun tiu dormanta pasaĝero ene.

La malfrua horo devis maltrankviligi lian edzinon kaj la konstanta bruo el la ŝtuparo pensigis ŝin. Mi vidis ŝin eliri sur la placeton de nia etaĝo ĝuste kiam la lifto denove revenis. La vidado de la dormanta edzo sur la lifta benko klarigis la aferon al ŝi, kiu tuj reiris hejmen, sed sen fermi la pordon. Strange, mi pensis. Sed baldaŭ la afero klarigis: ŝi revenis kun lankovrilo, kiun ŝi, pro kompato, metis sur la viraĉon por varmigi lin. Duonvoĉe ŝi diris: “Dormu bone, kara, kaj morgaŭ, kiam vi sobriĝos, mi jam taŭge skold os vin”.

verkis **Viktoro SOLÉ** el Katalunio

Fonto: “La blaga blogo”, revuo **Kontakto**, #277, 2017:1, p.17

Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 5)
(daŭrigata)



Sed dum Gregoro povis rekte ekscii neniun novaĵon, li subaŭskultis kelkon el la apudaj ĉambroj, kaj kie li nur aŭdis voĉojn, li tuj kuris al la koncerna pordo kaj premis sin tutkorpe kontraŭ ĝi. Precipe dum la unua tempo ne okazis interparolo ne temanta iel, kvankam nur sekrete, pri li. Dum du tagoj aŭdeblis ĉe ĉiuj manĝoj interkonsiloj pri kiel nun kondukti; sed ankaŭ inter la manĝoj oni parolis pri la sama temo, ĉar ĉiam estis almenaŭ du familianoj hejme, verŝajne pro tio, ke neniu volis resti hejme sola kaj ke oni ja neniukaze povis tute forlasi la loĝejon. Krome la servistino jam la unuan tagon - ne estis tute klare, kion kaj kiom ŝi sciis pri la okazintaĵo - surgenue petis la patrino, ŝin tuj maldungi, kaj kiam ŝi kvaronan horon poste adiaŭis, ŝi dankis sub larmoj pro la maldungo, kvazaŭ pro la plej granda bonfaro al ŝi farita tie, kaj donis, sen ke oni tion de ŝi postulis, teruran ĵuron, eĉ iometon al neniu malkaŝi.

Nur la fratino devis ankaŭ kuiri kun la patrino; tio ja ne kaŭzis multe da peno, ĉar oni manĝis preskaŭ nenion. Ĉiam denove Gregoro aŭdis, kiel iu vane instigis iun alian al manĝo kaj ricevis nenan respondon ol: "Dankon, mi havas sufiĉe" aŭ ion similan. Eble estis ankaŭ neniom trinkata. Kelkfoje la fratino demandis la patron, ĉu li volas havi bieron, kaj kore ŝi proponis sin mem por alporti ĝin, kaj kiam la patro silentis, ŝi diris al li, por forigi al li ĉian skrupulon, ke ŝi povas ankaŭ sendi la domzorgistinojn por ĝi, sed tiam la patro diris grandan "ne", kaj ne plu estis de tio parolate.

Jam en la unua tago la patro klarigis la tutan financan staton kaj la ŝancojn al la patrino kaj ankaŭ al la fratino. Iam kaj tiam li ekstaris de ĉe la tablo kaj iris por preni el sia eta Verthejm-monkesteto, kiun li estis savinta ĉe la antaŭ kvin jaroj okazinta bankroto de sia magazeno, iun kvitancon aŭ ian registrolibron. Oni aŭdis, kiel li malŝlosis la komplikan seruron kaj post elpreno de la serĉitaĵo reŝlosis. Tiuj klarigoj estis parte la unua ĝojigaĵo, kiun Gregoro povis aŭdi de post sia kaptiteco. Li estis pensinta, ke al la patro restis absolute nenio el tiu magazeno, la patro almenaŭ

dirintis al li nenion malan, kaj Gregoro tamen ankaŭ ne estis lin demandinta pri tio. La tuta tiama zorgo de Gregoro estis, entrepreni ĉion por plej eble rapide forgesigi al la familio la komercan katastrofon, kiu ĝin dronigintis en kompletan senesperon. Kaj tiel li tiam sin ĵetis en la laboron kun tute aparta ardo, kaj de eta komizo li kvazaŭ transnokte fariĝintis vojaĝisto, kiu havis kompreneble tute aliajn eblecojn gajni monon kaj kies laboraj sukcesoj tuj, forme de provizio, transformiĝis al kontanta mono, surtabligebla hejme al la miranta kaj feliĉigata familio. Estis belaj tempoj, kaj neniam poste ili ripetigis, almenaŭ tiom brile, kvankam Gregoro poste gajnis tiom da mono, ke li kapablis kovri la espezojn de la tuta familio kaj efektive kovris. Oni estis al tio simple kutimiĝinta, kaj la familio, kaj Gregoro; oni dankeme akceptis la monon, li volonte transdonis ĝin, sed aparta varmeco ne plu emis estiĝi. Nur la fratino tamen restis sufiĉe proksima al Gregoro, kaj estis lia sekreta plano, ŝin, kiu, malsame ol Gregoro, ege amis muzikon kaj sciis kortuŝe ludi violonon, venontan jaron, senkonsidere la grandajn kostojn kaŭzotajn de tio kaj kiujn oni certe devos kovri alimaniere, sendi al la konservatorio. Plurfoje dum la mallongaj restadoj de Gregoro en la urbo, en konversacioj kun la fratino estis menciata la konservatorio, sed ĉiam nur kiel bela revo, kies realigo ne estis pensebla, kaj la gepatroj eĉ tiujn senkulpajn menciojn ne ŝatis aŭdi; sed Gregoro tre decide pensis pri tio kaj intencis solene deklari ĝin dum la kristnaska vespero.

Tiaj en lia nuna stato tute senutilaj pensoj trakapiĝis al li, dum li tie staris vertikale gluite al la pordo kaj subaŭskultis. Kelkfoje li tute ne plu povis aŭskulti pro ĝenerala laceco kaj lasis malgardeme la kapon frapi kontraŭ la pordon, sed tuj retenis ĝin firme, ĉar eĉ la brueto, kiun li per tio kaŭzintis, estis apude aŭdita kaj ĉiujn mutiginta. "Kion li tie umas", diris la patro post paŭzo, evidente direktite al la pordo, kaj nur poste la interrompita konversacio iom post iom rekomenciĝis.

Gregoro eksciis nun, pli ol bezonate - ĉar la patro kutimis plurfoje ripeti siajn klarigojn, parte pro tio, ke li mem jam delonge ne plu okupiĝis pri tiuj aferoj, parte ankaŭ, ĉar la patrino ne ĉion komprenis -, por la unua fojo, ke malgraŭ la tuta misorto ankoraŭ postrestis el la malnova tempo kapitalo kvankam tre malgranda, kiun la netuŝitaj interezoj intertempe estis iomete kreskigintaj. Sed krome la mono, kiun Gregoro ĉiumonate estis hejmenportinta - li mem estis por si



reteninta nur kelkajn guldenojn -, ne estis tute forkonsumita, sed kolektiĝinta je malgranda kapitalo. gregoro, malantaŭ sia pordo, fervore kapjesis, ĝojigite de la neatenditaj prudento kaj ŝparemo. Verdire per tiuj superflujaj monsumoj li povintus ja malgrandigi la ŝuldojn, kiujn la patro havis ĉe la ĉefo, kaj la tago, en kiu li povos seniĝi je tiu posteno, estus multe pli proksima, sed nun estis sendube pli bone tiel, kiel la patro estis disponinta.

Ĉiakaze tiu mono tute ne sufiĉis por vivteni la familion nur de la interezoj; ĝi eble sufiĉis por konservi la familion unu, maksimume du jarojn, neniom pli. Ĝi estis do nur sumo, kiun oni vere ne tuŝu kaj kiu devis esti rezervita por ekstrema okazo; sed la monon por sin vivteni oni devis perlabori. Sed la patro estis, kvankam sana, tamen maljuna viro, kiu jam kvin jarojn neniom laboris kaj ĉiukaze devis ne tro fidi siajn fortojn; dum tiuj kvin jaroj, la unuaj ferioj de lia pena kaj tamen sensukcesa vivo, li estis multe grasiĝinta kaj pro tio fariĝinta iom peza. Kaj ĉu eble la maljuna patrino devis nun perlabori monon, ŝi, kiu suferis je astmo, al kiu jam migrado tra la loĝejo kaŭzis fortostreĉon kaj kiu pasigis ĉiun duan tagon kun spirpenoj sur la sofo ĉe malferma fenestro? Kaj ĉu devis perlabori monon la fratino, kiu estis ankoraŭ infano kun siaj dek sep jaroj kaj al kiu oni prefere lasu ŝian ĝisnunan vivmanieron, kiu konsistis el vesti sin plaĉe, dormi longe, helpi en la mastrumado, ĉeesti kelkajn modestajn amuzojn kaj precipe ludi violonon? Kiam la konversacio tuŝis tiun neceson perlabori monon, Gregoro unue delasis la pordon kaj sin ĵetis sur la apud la pordo troviĝanta malvarmeta leda sofo, ĉar li sentis sin varmega pro hontiĝo kaj malĝojo.

Ofte li kuŝis tie tra la tutaj noktoj, dormante eĉ ne momenton kaj dum horoj nur gratadis sur la ledo. Aŭ li ne ŝparis la grandan penon ŝovi seĝon al la fenestro por poste krabli sur la fenestra sojlo kaj, sin suprenpuŝante el la seĝo, apogi sin al la fenestro, evidente nur pro ia memoro al la liberiga sento, kiun li antaŭe spertis rigardante tra la fenestro. Ĉar fakte li vidis de tago al tago malpli precize la aĵojn eĉ nur iomete malproksimajn; la vidalvidan malsanulejon, kies vere tro oftan aspekton li antaŭe malbenadis, lia vido nun eĉ ne plu atingis, kaj se li ne precize sciis, ke li loĝas en la trankvila, sed plene urba Ŝarlota strato¹, li povus kredi, ke li rigardas el sia fenestro en dezertejon, en kiu la griza ĉielo kaj la griza tero sendistinge kuniĝas. Nur du fojojn la atentema fratino bezonis vidi, ke la seĝo staris ĉe la fenestro, kiam ŝi jam ĉiufoje, ordiginte la ĉambron, precize reŝovis la seĝon al la fenestro, ja eĉ de nun lasis malferma la internan fenestrolapon.

Se Gregoro nur povintus paroli kun la fratino kaj

danki ŝin pro ĉio, kion ŝi devis fari por li, li pli facile eltenus ŝiajn servojn; sed tiel li suferis pro ili. La fratino ja provis laŭeble forviŝi la embarason de ĉio ĉi, kaj ju pli da tempo pasis, des pli ŝi kompreneble sukcesis, sed ankaŭ Gregoro kun la tempofluo travidis ĉion multe pli klare. Jam ŝia eniro estis por li terura. Apenaŭ enirinta, ŝi kuris, sen preni la tempon por fermi la pordon, kvankam alie ŝi zorgis por ŝpari al ĉiu la vidon al la Gregora ĉambro, rekte al la fenestro kaj ĝin ŝire malfermis per hastaj manoj, kvazaŭ ŝi preskaŭ sufokiĝus, restis, eĉ kiom ajn estu malvarme, momenton ĉe la fenestro kaj spiris profunde. Per tiu kuro kaj bruo ŝi ĉiutage dufoje teruris Gregoron; la tutan tempon li tremis sub la kanapo kaj tamen tre bone sciis, ke ŝi certe tion al li volonte evitus, se al ŝi nur eblus restadi en ĉambro, en kiu troviĝis Gregoro, kun fermita fenestro.

Iam, eble jam pasis monato de post la Gregora transformiĝo, kaj por la fratino do verdire ne plu estis aparta kaŭzo por miri pri la aspekto de Gregoro, ŝi alvenis iom pli frue ol kutime kaj renkontis Gregoron, kiel li, senmova kaj vere timige rektigita, rigardis tra la fenestro. Gregoro ne mirus, se ŝi ne enirus, ĉar li malhelpis ŝin per sia teniĝo tuj malfermi la fenestron, sed ŝi ne nur ne eniris, ŝi eĉ retrosaltis kaj fermis la pordon; fremdulo efektive povus pensi, ke Gregoro embuskis kontraŭ ŝi kaj volis ŝin mordi. Memkompreneble Gregoro sin kaŝis tuj sub la kanapo, sed li devis atendi ĝis tagmezo, ĝis la fratino revenis, kaj ŝi aspektis multe pli maltrankvila ol kutime. Li konsciiĝis el tio, ke lia aspekto estis por ŝi ankoraŭ neeltenebla kaj certe ankau plu daure restos neeltenebla, kaj ke ŝi devas sin certe tre devigi por ne forkuri ĉe la vido eĉ de la malgranda parto de lia korpo elstaranta el sub la kanapo. Por ŝpari al ŝi ankau tiun aspekton, li iun tagon portis sur sia dorso - li bezonis por tiu laboro kvar horojn - la toltukon sur la kanapon kaj ordigis ĝin tiumaniere, ke li nun estis tute kovrita kaj ke la fratino, eĉ kiam ŝi sin klinis, ne povis lin vidi. Se tiu tolaĵo laŭ ŝia opinio ne estus necesa, ŝi povus ĝin ja forpreni, ĉar estis ja tute evidente, ke Gregoro ne povis senti plezuron sin tiom enfermante, sed ŝi lasis la tolaĵon tiel, kiel ĝi estis, kaj Gregoro eĉ kredis esti kaptinta dankeman rigardon, kiam li iam per la kapo prudente iom levis la tolaĵon por vidi, kiel la fratino akceptis la aranĝon.

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

Kabe – nia unua vortaristo

Tri nomoj sin levas kiel respondo al la demando, kiuj kreis la fundamenton de Esperanto kiel plentaŭga lingvo por literatura kreado: L.L. Zamenhof, A. Grabowski kaj Kabe. Pri Zamenhof kaj Grabowski mi parolis en miaj antaŭaj artikoloj. Ĉi tiun artikolon mi volas dediĉi al **Kabe**, la homo, kiu per siaj tradukoj de prozaj verkoj elegantigis la Esperantan prozan stilon sub la signo de klareco kaj ekvilibro, kaj nia unua vortaristo.



Fakte, Kabe estis lia pseŭdonimo, plumnomo, kiun li uzis por signi siajn Esperantajn verkojn. Kaj laŭ tiu nomo la esperantistoj ankoraŭ konas lin. Lia vera nomo estis **Kazimierz Bein**. Li estis polo kiel Grabowski, naskiĝis en 1872 kaj mortis en 1959. Profesie li estis medicinisto kaj okulkuracisto.

Li lernis Esperanton en 1895 kaj lia unua tradukaĵo, *La fundo de l' mizero* de la pola verkisto Wacław Sieroszewski, aperis en 1904. Post tio, ĉiujare ĝis 1912 aperis liaj verkoj, kelkfoje pluraj samjare, entute 14. En 1906 Kabe estis elektita kiel vicprezidanto de la Esperanta Akademio, kiun postenon li okupis ĝis 1911, kiam li, pro nekonataj kaŭzoj, ĉesis okupi sin pri Esperanto kaj forlasis la Esperanto-movadon.

La verkojn de Kabe oni povas dividi en du klasojn. Unuflanke estas liaj prilingvaj kaj pedagogiaj libroj, kie elstaras lia *Vortaro de Esperanto* (1910). Aliflanke estas liaj tradukoj, kie elstaras *La Faraono*, romano de la granda pola verkisto Bolesław Prus. Ĉi tie mi pritraktetos nur la *Vortaron* kaj *La Faraonon*.

Vortaro de Esperanto de Kabe estas la unua ĝenerala vortaro de la lingvo kun samlingvaj difinoj kaj ekzemploj. La difinoj de la *Vortaro* de Kabe havas la ĝeneralan stilan karakteron de liaj verkoj: klarecon, trafecon kaj elegantecon. Mi menciis nur unu ekzemplon. La verbo *kuri* estas simple sed trafe difinita kiel “rapide sin movi per la piedoj”. Ekzemplo: “La homo ne kuras tiel rapide, kiel la ĉevalo.” En PIV (*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*) la difino estas pli analiza: “iri per movoj pli rapidaj ol en marŝo, dum kiuj ambaŭ piedoj periode troviĝas samtempe en la aero”.

La *Vortaro* de Kabe estis varme akceptita de la esperantistoj. Ĝi estis reeldonita en 1925 kaj ankoraŭ havas grandan valoron, ne nur leksikan, sed ankaŭ

artan. Oni sentas serenajn ĝuon, legante ĝiajn senkomplikajn difinojn kaj koncizajn, memklarigajn ekzemplojn.

La Faraono estas granda verko, trivoluma. Ĝi aperis en 1907 kaj post tiam aperis du eldonoj, la lasta en 1957, kio atestas la gravan lokon, kiun ĝi okupas en la Esperantlingva literaturo. La okazejo de la romano estas antikva Egiptujo kaj la ĉeftemo estas konfliktoj inter la potenca pastraro kaj la kronprinco, kiu mem celas plenan potencon. La verko abundas je priskriboj de la cirkonstancoj, kutimoj kaj moroj de la tiuepokaj Egiptoj.

Ofte kaj ripete oni laŭdis la stilon de la Esperantaj tradukoj de Kabe, kiujn oni epitetas kiel modele simplajn kaj klarajn. En intervjuo en la revuo *Literatura Mondo* en 1931 Kabe asertis, ke “por havi bonan stilon, nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn.” Tiu antaŭkondiĉo, verŝajne, estis pravigebla en la unuaj jaroj de Esperanto kiel literatura lingvo. Sed nuntempe junaj esperantistoj certe povas akiri simplan kaj klaran Esperanto-stilon per senpera studado de verkoj de bonaj Esperanto-stilistoj. Inter tiuj la tradukaĵoj de Kabe daŭre okupas gravan lokon. De Kabe oni povas, ekzemple, lerni kiel uzi la simplan finaĵon *-is* por laŭeble eviti kunmetitajn verbo-formojn kiel *estas -inta, estis -inta*, kiuj pezigas la stilon. En la menciita intervjuo Kabe esprimas sian admiron pri la stilo de Zamenhof: “Kiel stilisto li estis bonega, ĉar li havis lingvon eksterordinare simplan.” Tamen la stiloj de tiuj niaj du klasikaj stilistoj, fakte, ne tre similas. Ekzemple, en siaj originalaj verkoj Zamenhof ofte uzas kunmetitajn frazojn, cetere ĉiam tre klare kaj logike konstruitajn.

Stilo multe dependas de la enhavo kaj celo de la teksto. La originalaj verkoj de Zamenhof grandparte havas analizan aŭ retorikan karakteron, kio postulas apartan stilon, ofte kun longaj frazoj. Kabe neniam verkis originale kaj tradukis preskaŭ nur rakontajn verkojn, kiuj kutime ne estas stile malsimplaj. Tio, verŝajne, influis ankaŭ la stilon de Kabe. En nia originala literaturo do ambaŭ stiloj havas fortikan bazon en la klasikaj verkoj de Zamenhof kaj Kabe.

de **Baldur Ragnarsson**


(Juna amiko, n-ro 92, 2000)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/kabe.html>

Bruligu la vian tutan diskaron!

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

La ambulanco ululis laŭlonge de la trafikplenaj stratoj urbaj. La malsanulo, kiun ĝi hastege alkondukis al la malsanulejo, bezonis urĝan konsultadon de specialisto. Sarah, tiel nomiĝis, estis vekiĝinta kun dekkvar kruroj.



"Panjooooooooo" veis la kompatinda knabino, kaj ŝia patrino tujege alvokis la urĝan helpon.

Post kiam la kuracisto ekzamenis ŝin, li rapide identigis la kialon de tiu dekkvarkrura vekiĝo:

- "Estas alergio reago de la imunsistemo kontraŭ la repa kaj ĝenerale kontraŭ la hodiaŭa popa muziko. Ĉi tia korpa respondo pli kaj pli ofte aperas niatempe inter la gejunuloj kiuj kutime aŭskultas tiun merdon. Kion vi estis faranta hieraŭ antaŭ ol endormiĝi?"

- "Mi metis diskon de Justin Bieber en la diskoturnilon kaj poste.."

- "Bruligu ĝin. Bruligu la vian tutan diskaron. Mi priskribas al vi la aŭskultadon de la Beatles'a muziko dum du semajnoj, matene tagmeze kaj vespere, kaj la simptomoj malaperos kaj vi resaniĝos"...

FRINGELO KAJ KOLOMBO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Kaptilon, pro hazard', ektrafis la fringel'.
La malfelicha bird' baraktis kaj batalis,
Sed la Kolomb-junul' nur mokis kaj moralis:
"Jen kia hont'! Dum hela tag'
Kaptilon vi enfalis!
Ne trompus min hazarde tiu ag',
Mi tion garantias ghuste."
Sed jen Kolombo mem baraktas en kaptil'.
Do juste!
Al fremda malfelich' ne moku kun facil'!



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Amuza Matematiko

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Du indianoj

Se unu el ili donas 40 rupiojn (india monunujo) al la dua ili havos egalajn monsumojn. Se la dua donas 40 rupiojn al la unua tiam la unua havos duoblan monsumon de la dua. Kiom da rupioj havis dekomence ĉiu indiano?

Solvo

Ni formas la jenajn ekvaciojn kie X estas la unua kaj Y estas la dua indiano.

$$X - 40 = Y + 40$$

$$X + 40 = 2 (Y - 40)$$

El la unua ekvacio ni obtenas:

$$X = Y + 80$$

Se ni substituos tiun en la dua ekvacio:

$$Y + 80 + 40 = 2Y - 80 \rightarrow Y = 200 \text{ (la monsumo de la dua indiano en la komenco)}$$

kaj

$$X - 40 = 200 + 40 \rightarrow X = 280 \text{ (la monsumo de la unua indiano en la komenco)}$$

Rezulto

La unua kaj la dua indiano en la komenco havis 280 kaj 200 rupioj respektive.






Nepo Tim kun Virkato Murkel, paŝtelaĵo, 30 x 40 cm, 1999

Tim havis la virkaton Murkel kun la malhel-orflavaj tigrostrioj kaj la M sur la frunto. Ambaŭ tre amuziĝis. La virkato nur vivis en la loĝejo. Murkel dormis – kaj lasis sin karesi – en la lito de Timĉjo. Ili kreskis kune. Kiel bazon de ĉi tiu bildo, mi havis foton de ambaŭ. Ili ja ne povintus resti senmovaj sufiĉe longe! Per la bildo, mi volis montri la intiman rilaton de la infano al sia amata besto. Mi tre ŝatis desegni per

paŝtelkreto, ekzemple sur ebonkolora papero kiel ĉi-kaze. Kompreneble mi amas mian ununuran nepon Tim Lorenz. Nun li havas 28 jarojn.



Tim flegis Murkel 16 jarojn ĝis la morto. En mia bildo ambaŭ vivas eterne, tiel longe kiel tiu desegnaĵo ekzistos.

Postparolo

Tiu bildo ĝojigis la vizitantojn de pluraj el miaj ekspozicioj. Poste, ĝi pendis apud la paŝtelaĵo "Manfred kun virkato Mikis":

En 2009 en la Nova Urbodoma Oficejo de la Lutherurbo Vitenbergo (Lutherstadt Wittenberg) en la ekspozicio "Homoj kaj bestoj".

En 2015 en la galerio "Galerie am Ratswall" en Biterfeldo (Bitterfeld) kaj poste en la "ratkaptista urbo" Hameleno (Hamel) okaze de la 92a Germana Esperanto-Kongreso 2015, en 2002 en Ketŝo ĉe la Rejno (Ketsch am Rhein) kaj poste en la urbodomo de Hokenhejmo (Hockenheim). Tiun bildon Nepo Tim kun Virkato Murkel fotis la gazeta fotisto dum la granda vernisaĝo. Kaj Ĵurnalistino intervjuis min por la bona artikolo en tiu gazeto.

sendis **Helga Plötner** portretistino el Germanio

(Tradukis Martin Brüggemeier el Ahaus, Germanio)

Mia biblioteko

*En la multaj libroj
de mia biblioteko
miloj da homaj sortoj
kvazaŭ dormadas
sur lito inter vicoj.*

*Roluloj, kvazaŭ en infana fabelo
estas jam ŝtonigitaj
per magia bastono de sorĉistino.
Nur trafoliumante
mi ilin vekus
por viva rekomenco.
Ho, kiom multe da libroj mi
posedas
kaj nur malmulte da tempo ĉe mi
restas.*

*Tamen mi certas
Ke en plimulto de libroj
apenaŭ mi vekigos*


ties ŝtonigitajn rolulojn.

*Mi rigardas amece
tiujn indiferentulojn
kiuj preskaŭ min forgesis.
Sufokas nostalgio
Min, homon
kiu karajn proksimulojn
neniam plu renkontos.*

*Ŝovas ni tagojn per iluzio
ke ni posedas la librojn.
Dume ili tute kvietaj
atendas novaj amojn
por sin veki
de longa dormeto*


*Ĉar ni estas pli provizoraj
ol niaj libroj mem.*

Tirana, 28.12.2017



En Falun, en Svedujo, troviĝas granda minejo, kiu ludis gravan rolon kiel fonto por oro, arĝento, sed ĉefe por kupro dum pli ol jarmilo.

En 2001 ĝi fariĝis loko de Monda Heredaĵo de Unesko. En la jaro 1719, do ekzakte antaŭ 301 jaroj, ministoj trovis dum la laborado en la minejo kadavron de ministro, kiu malaperis tie en la jaro 1677, kaj estis tute konservita per kupra vitriolo, kiu troviĝas en la rokoj. (Kupra vitriolo estas malnova nomo por kupra sulfato. En la rakonto oni nomas ĝin fera vitriolo). Lia iama fianĉino, kiu ankoraŭ vivis, kiam li estis trovita, povis identigi lin kiel sian fianĉon, perdintan antaŭ 42 jaroj, mallonge antaŭ la planata geedziĝo.



Tomboŝtono ĉe la Stora Kopparbergs kyrka (Granda Kupromineja Preĝejo): „Por la memoro pri ministro Mats Israelsson, kiu pereis dum la laboro en la minejo de Falun, 1677.“

(La bildsubskribo estas traduko de germana vikipedia artikolo)

Tiu vera okazaĵo inspiris kelkajn aŭtorojn. Eĉ opero estis komponita, kiu baziĝas sur tiu eta rakonto de Hebel.

La rakonto aperis en la jaro 1811 en „Rheinischer Hausfreund“ (Rejnlanda Domamiko), verkita de la svisdevena instruisto kaj aŭtoro Johann Peter Hebel (1760-1826), kiu vivis en suda Germanio. Tiu publikaĵo estis tipa ekzemplero de „Kalendergeschichten“ (kalendaraj rakontoj), kiuj estis tiuepoke tre popularaj. Ili formis kvazaŭ propran literatur(sub)ĝenron. En ĝi troviĝis mallongaj priskriboj de fremdaj kulturoj kaj interesaj, kelkfoje humorplenaj, ofte strangaj aŭ kuriozaj rakontetoj el la tuta mondo, parte fikciaj, parte veraj okazintaĵoj. Hebel rakontis veran eventon, sed li aldonis kelkajn nekonatajn detalojn kaj surscenigis la eventojn ĉirkaŭ cent jarojn poste. Por ilustrai, kio okazis dum la malapero de la ministro, kiom la mondo ŝanĝiĝis intertempe, li listigis tre dense kelkajn eventojn dum la „kvindek jaroj aŭ pli“ de sia rakonto, kiuj fakte en la realo estis kvardek du jaroj.

Johann Peter Hebel

Neatendita revido



En Falun en Svedujo antaŭ kvindek jaroj aŭ pli, juna ministro kisis sian junan, ĉarman fianĉinon kaj diris al ŝi: „Je la festotago de Sankta Lucia¹ nia amo estos benata de la mano de l' pastro. Tiam ni estos edzo kaj edzino kaj konstruos por ni propran nesteton.“ – „Kaj paco kaj amo loĝu en tio“, diris la bela fianĉino kun favora rideto, „ĉar vi estas ĉio por mi, kaj sen vi mi preferus esti en tombo ol aliloke.“ Sed kiam antaŭ Sankta Lucia la pastro vokis la duan fojon: „Se nun iu povus sciigi kontraŭaĵon, kial tiuj personoj ne kuniĝu kiel geedzoj...“, tiam anoncis sin la morto. Ĉar kiam ja junulo je la venonta mateno preteriris ŝian domon en sia nigra ministra vestaĵo - la ministro ĉiam surhavas sian ĉemizon de mortinto - tiam li ja frapis ŝian fenestron ankoraŭfoje kaj diris al ŝi ‚bonan matenon‘, sed ne plu ‚bonan vesperon‘. Neniam plu li revenis el la minejo, kaj je la sama mateno vane ŝi orlis nigran koltukon kun ruĝa rando por li, okaze de la geedziĝa tago. Ĉar li neniam revenis, ŝi formetis la koltukon, ploris pri li kaj neniam forgesis lin.

Intertempe Lisbono en Portugalio estis detruita pro tertremo, kaj la Sepjara Milito pasis, kaj la imperiestro Francisko la 1-a mortis, kaj la jezuita ordeno estis malfondita kaj Pollando dividita, kaj la imperiestrino Maria Theresia mortis, kaj Struensee² estis ekzekutita, Ameriko liberiĝis, kaj la unuiĝintaj franca kaj hispana armeoj ne sukcesis konkeri Gibraltaron. La turkoj enfermis generalon Stein³ en la Veteranan Kavon³ en Hungario, kaj ankaŭ imperiestro Jozefo mortis. Gustavo, la reĝo de Svedio, konkeris Rusan-Finnlandon, kaj la Franca Revolucio kaj la longdaŭra milito komenciĝis, kaj ankaŭ imperiestro Leopoldo la 2-a entombiĝis. Napoleono konkeris Prusion, kaj la angloj bombardis Kopenhagon, kaj la agrokulturistoj semis kaj rikoltis. La muelisto muelis, la forĝistoj martelis, kaj la ministoj fosis por la metalvejoj en sia subtera metiejo.

Sed kiam en la jaro 1809 ĉirkaŭ la tago de Sankta Johano⁴ la ministoj en Falun volis trafosi aperturon inter du ŝaktoj, ĉirkaŭ tricent ulnojn⁵ profunda sub la grundo, ili elfosis el la ŝtonrubo kaj el la vitriola akvo la kadavron de junulo, kiu estis plene trapenetrita de fera vitriolo, sed krom tio neputrinta kaj neŝanĝita, tiel ke oni povis tute rekoni liajn vizaĝajn trajtojn kaj aĝon, kvazaŭ li mortis ne antaŭ pli ol unu horo aŭ endormetis pro laboro. Sed post kiam oni

portis lin surfacen - la gepatroj, la geamikoj kaj la konatuloj jam delonge mortis kaj neniu memoris la dormantan junulon aŭ pri lia malfeliĉo - tiam alvenis la eksa fianĉino de tiu ministro, kiu iun tagon iris en la minejon kaj neniam revenis.

Grizhara, ŝrumpinta kaj helpe de lamulbastono ŝi alvenis la lokon kaj rekonis sian fianĉon; kaj pli ĝoje ravita ol kun doloro ŝi sinkis sur la amatan kadavron, kaj nur post kiam ŝi ripozis de longdaŭra emocio, ŝi diris fine „estas mia fianĉo, pri kiu mi funebriis dum kvindek jaroj, kaj kiun Dio lasas min vidi ankoraŭfoje antaŭ mia vivofino. Ok tagojn antaŭ la geedziĝo li iris en la minejon kaj neniam revenis.“ Tiam la animoj de ĉiuj ĉeestantoj afliktiĝis kun malĝojo kaj larmoj, kiam ili vidis la iaman fianĉinon nun kun la aspekto de forvelkinta senforta aĝo kaj la fianĉon ankoraŭ en lia junaspekta beleco, kaj kiel en ŝia brusto eĉ post kvindek jaroj la flamo de la juneca amo denove vekigis; sed ne plu li malfermis la buŝon por rideto aŭ la okulojn por rekono. Fine ŝi portigis lin de la ministroj en sian ĉambregon, kiel la sola, kiu apartenis al li, kaj kiu havis rajton pri li, ĝis lia tombo estos preparita en la tombejo. Je la venonta tago, post kiam la tombo estis pretigita kaj la ministroj venis por porti lin tien, ŝi malŝlosis kesteton, ĉirkaŭigis lin per la nigra-silka koltuko kun ruĝaj strioj kaj akompanis lin, en sia dimanĉa vestaĵo, kvazaŭ tio estus ŝia edziĝtago sed ne la tago de lia enterigo. Ĉar, kiam oni metis lin en la tombon, ŝi diris: „Dormu nun bone, ankoraŭ unu tagon aŭ dek en la malvarmeta geedziĝa lito, kaj ne lasu la

tempon esti longdaŭra por vi. Mi okupiĝas pri io nur iom da tempo kaj venos baldaŭ, kaj baldaŭ tagiĝos denove. Kion la tero redonis unufoje, tion ĝi ne konservos duan fojon“, ŝi diris, kiam ŝi foriris kaj retrorigardis ankoraŭfoje.

Piednotoj:

1) *Festotago je la 13-a de decembro, la memortago de Sankta Lucia. Antaŭ la enkonduko de la Gregoria Kalendaro en Svedujo ĝi estis la plej mallonga tago de la jaro. Nuntempe ĝi estas ankoraŭ unu el la plej gravaj festoj en Skandinavio.*

2) *Germana persona kuracisto de la dana reĝo Kristian la 7-a. Li kaŭzis skandalon pro amafero kun la reĝino. Lia potenco kaj influo trograndiĝis kaj li estis ekzekutita en la jaro 1772.*

3) *Temas pri okazintaĵo en 1788, dum la Rusa-Austria-Turka Milito, kiam majoro Stein (ne generalo, kiel dirite en la rakonto) defendis sian trupon en la Veterana Kavalo en Hungario.*

4) *Kristana festotago je la 24-a de junio kun rilato al la somera solstico, do al la plej longa tago de la jaro.*

5) *lama mezurunuo de longeco*

tradukis kaj sendis **Frank Lappe** el Germanio

Por la kontrollego mi dankas al Anina Stecay


Ozimandias (Ozymandias) *

-- poemo de Percy Bysshe Shelley

Mi renkontis vojaĝanton el antikva lando,
Kiu diris - "Du vastaj kaj senkorpaj kruroj el ŝtono
Staras en la dezerto... Proksime al ili, sur la sablo,
Duone enprofundiĝinte vizaĝo kuŝas, kies fruntosulko,
Kaj sulkiĝinta lipo, kaj rikano de malvarma ordo,
Diras, ke ĝia skulptisto, perfekte prezentis la pasiojn,
Kiu ankoraŭ postvivas stampite sur ĉi tiuj senvivaj aĵoj,
La mano, kiu mokis ilin, kaj la koro, kiu nutris;
Kaj sur la piedestalo aperas ĉi tiuj vortoj:
Mia nomo estas Ozimandias, Reĝo de la Reĝoj;
Rigardu al miaj Laboroj, vi potenculo, kaj malesperiĝu!
Nenio restas apude. Ĉirkaŭ la kadukaĵo
De tiu kolosa Restaĵo, senlime kaj nude
La solaj kaj ebenaj sabloj etendiĝas malproksime."

-- poemo de Percy Bysshe Shelley

* Ozimandias (Ozymandias, greke: Όσυμανδύας)
estas la greka nomo de la egipta faraono Rameses II



tradukis kaj sendis **Coşkun Atak** el Turkio



Ŝi eliris el la aŭto, la lasta moda fabrikmarko de la aŭto-industrio, eleganta, bela, luksa. Ŝi estis vestita per la marko "Versace", kio estis videbla unuavide. Galante ŝi turnis sin al ĉiuj flankoj por kontroli, ĉu ŝi estis rimarkita. Ho, jes, la paparazoj estis ĉi tie. Fotiloj ekklakis, kameroj ekis. Trankvila kaj memamanta ŝi skuis sian belan kapon. Ŝiaj belegaj blondaj, bonaspektaj hararoj disfaliĝis sur ŝiaj ŝultroj. Ŝi haltis tuj antaŭ la enirejo de la moda domo "Versace".

- Sinjorino, - la servisto el la magazeno, klininta ŝultrojn, diligente etendis sian manon - la ŝlosilojn, mi petas!

Kun iom da malrespekto, la damo metis la ŝlosilojn, de la arĝenta "Honda", en lian manon, aldonante:

- Estu ĝi ĉi tie post tri horoj! Mi ne atentos! - pensante "Ĉu mi sukcesos, dum tiom malmulta tempo, serĉi, provi kaj aĉeti? Montri mian novan vizaĝon al la klaĉulinoj, rakonti pri la nova dieto, per kiu mi jam perdis 300 gramojn sen sekvi severajn dietojn. Eĉ la ĉokolado estas permesita."

Ŝi ĉirkaŭrigardis ĉiujn flankojn. La paparazoj estis sur siaj lokoj. Kun kontenta rideto sur la vizaĝo, ŝi ekmarŝis al la enirejo de la modmagazeno.

Sed ...

- Ho, Dio mia, - ŝi ekkriis.

Kaj kio okazis en la sekvaj minutoj, ŝi eĉ ne povis kompreni. Malpura bubo blokis ŝian vojon, petante almozon. De kie ĝi venis? Kiel alproksimiĝis kaj kiu permesis al ĝi?

- Helpon !!! Kio estas ĉi tiu naŭza estaĵo? - ŝi ne finis ankoraŭ sian indignon dum kio la infano estis forpelita. La oficisto trenis la infanon je la kolumo de lia eluzita manteleto, kaj ĵetis lin sur la straton. La knabo timigite rigardis la rapidantajn aŭtojn, kiuj preskaŭ venos super ĝi, preterpasante unu la alian.

- Kial vi venis denove? Mi diris al vi hieraŭ, ke via loko ne estas ĉi tie! Mi avertis vin, ke se vi aperos denove, mi telefonos al la polico, por ke oni forvenigu vin tie, kie estas via loko... For ! Kaj miaj okuloj neniam revidu vin tie ĉi! Li eksvingis, kaj lia peza mano frapis la kapon de la knabo.

- Mi nur volis ...- La infano ne sukcesis diri siajn vortojn, ĉar sekvis novaj battoj sur lia vizaĝo kaj kapo. Sango elfluis el lia nazo, kiun li provis viŝi per la maniko de sia trafotita manteleto. La knabeto kuntiriĝis pro doloro, kaj liaj profundaj, malĝojaj okuloj pleniĝis je larmoj, kiuj fluis sur liaj ekflamantaj vangoj.

Li venis ĉi tien esperante ricevi almozon, ne por

si mem, sed por sia malsana patrino, kiu estis en lito hejme ekde du semajnoj. Domo, se oni povus nomi tiel la barakon, kie li loĝis kun siaj du pli junaj fratinoj. Li nun estis la estro de la familio, post kiam lia patro mortis en fabrika akcidento, kaj li ne ricevis kompenson. Oni ankaŭ forprenis la oficejan loĝejon, kiun ili ne plu rajtis.

- Kaj hodiaŭ mi ne sukcesis! - Li pensis laŭte. - Ĉi tien venas la plej riĉaj ... Kial? ... Li ne metis pecon da pano en la buŝon dum tri tagoj. La malmultaj moneroj, kiujn iu maljunulino donis al li en la merkato, sufiĉis nur por unu pano kaj kelkaj tomatoj.

- Mi ŝtelos! Tio estas peko, sed mi devas nutri mian patrinon...

Kuntiriĝinte pro doloro kaj timo, li apenaŭ povis transiri la trafikatan straton. Aliflanke estis malgranda nutraĵvendejo en la angulo. Li eniros por peti panon kaj iom da kolbaso, kaj li vespere lavos la plankon. Li rakontos ilin pri sia patrino kaj siaj du fratinoj. Pro sia patro forpasinta. Se apenaŭ kortuŝu ilin.

"Kaj se ili ne donos al mi? Mi ekgvatos la vendistinon kaj prenos kion ajn mi povus por manĝado" - li pensis, kaj marŝis pli memfide al la pordo de la butikoj.

- Kion vi faras ĉi tie denove? - Severa vira voĉo ekkriis la bubon. - Mi forpelis vin hieraŭ, vi estas ĉi tie denove. Nu, foriru!...- Forta vira mano ĵetis lin al la strato, kie preterflugis luksaj veturiloj, gvidataj de elegantaj sinjorinoj kaj negocistoj.


verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario



Kio Okazus?

Kio okazus kiam vi konstruos ĉie,
kiam vi ne lasos spacon por eĉ unu floro,
kiam vi kovros la sunlumon
kaj senzorgigos la popol-menson,
kiam vi plenigos ĉie per dumpado
per la digitala numero
signifanta monon, plenecon,
signifanta nenion kaj ĉion
ĉar senatende ĉio malaperos?

Kiam ĉio iĝos elektronika nuboj
kaj mi kaj vi ne povos algrimpi ion
ĉar oni nin senigos ne de vestoj sed de nia mondo
kaj kio okazus se vi kovros la ĉielon
per beton-fumo malpurigante la akvon,
kiam vi plenigos la kolombajn truojn
kaj la minojn malplenigitajn de la musoj
ĝis kiam vi ne trovos spacon kie vivi



aŭ malstreĉiĝi?

Kaj kio okazus kiam ni vekiĝos kaj trovos,
ke tiam estos tro malfrue
ĉar oni ne povos reveni?

-- poemo de **Alfred Grech**

*Malta advokato kaj poeto (vivanta ĉe la apuda insulo,
Gozo)*

tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

Forpasis Eduardo Larrouy, la dojeno de nia movado

La 27-an de aprilo 2020 en Bilbao (Hispanio) mortis Eduardo Larrouy (1913-2020), kiu la 9-an de marto iĝis 107-jara, kaj ni havis la okazon gratuli pro tiu evento al unu el la homoj plej maljunaj en Hispanio kaj eble al la plej maljuna en Esperantio.

Eduardo Larrouy (pron.: Larrúj) naskiĝis la 9-an de marto 1913 en Haro, urbeto apartenanta al hispana regiono La Rioja, fama pro ĝiaj vinberoj kaj vinoproduktado. Lia patro, enologo, veturis tien el franca Vaskio por labori. Tre juna Eduardo ekinteresiĝis pri Esperanto en la jaro 1932 (19-jara) kaj aliĝis al kurso, gvidata de la elstara esperantisto Alberto Díaz Chapartegui en la lernojaro 1932-33. La sekvontan lernojaron li mem fariĝis instruanto kaj en 1935 eniris la estraron de la asocio kiel voĉdonanto.

En julio 1936 en Hispanio komenciĝis intercivitana milito (1936-39) kaj tre malhelaj jaroj por la Esperanta-movado kaj por la tuta hispania popolo. La armeo de Franco eniris Bilbaon en junio 1937 kaj fermis la Esperanto-Grupon. Dume, Eduardo partoprenis la militon. Post la malvenko li, same kiel aliaj esperantistoj, travivis malagrablajn spertojn, kiuj sufiĉus por plenigi romanon.

Li estis kaptita en la urbo Santander kaj enkarcerigita en la urba sportejo; tie li havis la okazon instrui Esperanton al aliaj malliberuloj. Post Santander li estis enkarcerigita en Bilbao kaj poste en koncentrejo speciale rezervita por la membroj de la "internaciaj brigadoj". Kiel "memoraĵon" de la milito, li

ricevis du kuglojn en sia korpo.

Post la liberiĝo Eduardo Larrouy okupiĝis ĉefe pri negocado kaj benzinstacioj ĝis sia emeritiĝo en 1978.

Multaj jaroj pasis post la milito, ĝis kiam la Esperanta movado povis renaskiĝi en Bilbao, ĉar Esperanto ne estis leĝa ene de la diktaturo de Franco. Post sia emeritiĝo li ekde 1979 estis prezidanto de la Esperanto-Grupo, kaj ankaŭ poste apartenis al diversaj estraroj, ege aktive li partoprenis en la organizado de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo (1981), okaze de kiu en Bilbao gastigis kongreseton kun partopreno de esperantistoj el la tuta Hispanio.

Same, lia laboro estis tre grava por la sukceso de la hispana kongreso en 1989 kaj de la eŭropa en 2004. Dum postaj jaroj li partoprenis preskaŭ ĉiujn kongresojn universalajn kaj hispanajn.

Ni fermas tiun ĉi nekrologon per unu el liaj preferataj frazoj: "Rigardu ĉiam antaŭen, neniam malantaŭen".

Jesús M. García Iturrioz

Fonton: La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2020/04/nekrologo-47>



Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearnila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinaraj armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

8) Nagasaki, kiun mi vidis en la aĝo de 10 jaroj



Rakontita de s-ino ŜIMOHIRA Sakue 87-jara, loĝanta en Nagasaki, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Asahi

la 24an de oktobro 2019



Jam pasis 40 jaroj post kiam mi komencis rakonti pri la teruro de nukleaj armiloj. Ankaŭ nun mi rakontas al la lernantoj, kiuj vizitas la urbon Nagasaki.

Kiam mi estis 10-jara en la elementa lernejo Ŝirojama en Nagasaki, mi estis atombombita. Eu tiu aŭgusto preskaŭ ĉiun tagon sirenoj alarmis nin pri la aeratako de usonaj bomaviadiloj, tial mi pasigis multajn horojn en la ŝirmejo 500 metrojn for de mia hejmo en la distrikto Aburagi. La distrikto situis 800 metrojn for de la epicentro de la atombombado. Mia patro laboris en la urbo Isahaja kiel militlaboristo. Ĉiun matenon li ekiris je la 4a matene kaj revenis hejmen je la 10a vespere.

La 9an de aŭgusto, matene sireno alarmis nin pri la aeratako, sed mi ne volis iri al la ŝirmejo kaj ludis en la domo apud la patrino. Ŝi diris al mi, “Mi antaŭsentas, ke hodiaŭ vere okazos aeratako”, kaj hastigis min kaj mian 8-jaran fratinojn kun 1-jara nevo al la ŝirmejo. La patrino restis hejme, preparante akvon kaj forprenante la fenestrojn kontraŭ la ebla aeratako. Ni reciproke adiaŭis, svingante manojn, kaj tio estis la eterna adiaŭo inter ni.

Post iom da tempo la alarmo estis nuligita. Knaboj gaje ekstereniris. Mi, mia fratino kaj la nevo restis en la ŝirmejo. Subite lumegis kaj aperis nigraĵo en miaj okuloj. Mi svenis. Tio okazis je la 11-a kaj 2 minutoj. Ni estis en la fundo de la ŝirmejo, do ni evitis elmetiĝon de varmega radio. Kiom da minutoj pasis? Mi estis vekita de iu kaj rekonsciiĝis. Tie mi vidis mizeregajn homojn pikitajn de vitropecoj sur la tuta korpo kaj homojn en ĉifonaj vestaĵoj. Tiaj homoj sinsekve eniris en la ŝirmejon. Ili ĉiuj estis tiel vunditaj kaj preskaŭ nudaj, ke mi ne povis rekoni ilin.

Mi aŭdis kriojn “Panjo, panjo!”, kaj subite mi rememoris mian patrinojn kaj kriante esploris. Neniu el mia familio aperis al la ŝirmejo. Kio okazis ekstere? Mi komprenis, ke io ne imagebla okazis.

La aero en la ŝirmejo pli kaj pli malbonodoris kaj sufokis nin. Vespere aŭdiĝis voĉo de mia patro. “Venis Paĉjo!” Tiun momenton mi kaj mia fratino denove ploregis. Patro diris al ni, “Ne restu ĉi tie. Vi mortus!”, kaj ni ekstereniris. Tie estis monto da kadavroj. Ĉe la enirejo de la ŝirmejo kuŝis brulvunditaj homoj kun pendantaj haŭtoj kaj kun ĝemadoj. Ni paŝis, atentante, ke ni ne piedpremu mortintojn kaj mortantojn.

Kiam la patro sciis, ke miaj patrino kaj fratino ne troviĝas, ni iris al la distrikto de mia domo. La distrikto

estis en la flamego. En la sekvanta tago ni denove iris al la distrikto. Ni apenaŭ rekonis nian domon dank' al la restinta betona pordo. Inter la ruinaĵoj vidiĝis kadavro. Ĝi estis mia 22-jara fratino. Mirakle ŝia vizaĝo estis sen vundoj. Post du tagoj ni trovis mian patrino en la najbara domo. Ni rekonis ŝin per ŝiaj orplakitaj dentoj. Kiam mi tuŝis la nigre bruligitan korpon, ĝi peciĝis. Ni kolektis lignopecjn el la ruino kaj bruligis ilin. Tie kaj ĉi tie estis fumo de kremaciado.

Mia plej aĝa frato mortis en la maro de Filipino kiel kamikazo. Mia dua frato, studanta medicinon, tute ne vundiĝis, sed eksuferis pro sangado kaj laksado, kaj vomante flavaĵon, mortis post 4 tagoj. Mia juna



fratino, kiu estis kun mi en la ŝirmejo, pluivis. Tamen, kiam ŝi estis 18-jara, ŝi estis operaciita je la ĉekumo, kaj la vundo ne fermiĝis eble pro manko de blankaj sangoglobetoj pro la radioaktiveco. Ŝi fariĝis tro nervoza pro malbonodoro el la vundo, kaj kiam ŝi estis 19-jara, ŝi mortigis sin sub trajno.

Mi komencis paroli pri mia sperto en Nagasaki antaŭ 40 jaroj, ĉar mi ekpensis, ke rakonti tiun tragedion estas devo de postvivintoj. Troviĝas multaj homoj, kiuj ne scias la realon en Nagasaki kaj Hiroŝima.

Kiam mi aŭdas iujn elparoli pri ebleco uzi nukleajn armilojn aŭ movon por produkti uzeblajn nukleajn armilojn, mi estas plena de kolerego. Granda urbo povas ruiniĝi per unu nuklea armilo. Eĉ se ni postvivas la katastrofon, ni ne povas vivi homece kun homa digno dum la tuta vivo, suferante pro vundiĝo, cikatroj kaj perdo de siaj familianoj. Ni devas nepre aboli tiajn armilojn.

Tamen estas ne malmultaj landoj, kiuj posedas aŭ volas posedi nukleajn armilojn, eble pro sencio pri vera teruro de la nukleaj armiloj. Tiuj, kiuj ne povas kompreni, kiel granda tragedio ekestos el la uzo de nukleaj armiloj, parolas la uzon senpense.

Sencio estas problemo ankaŭ en Japanio. Kiam ni atombombitoj formortos kaj neniu povos rakonti pri la teruro de la nukleaj armiloj, ekestos vera krizo. Tial mi rakontadas mian sperton al lernantoj por semi kontraŭatombomban ideon. Aperas knabinoj en la mondo, kiuj kontraŭas la tergloban varmiĝon kaj batalas por paco. Mi esperas, ke ili, ricevante la semojn, kiujn mi semas, heredos la torĉon de paco kaj abolo de nukleaj armiloj.

(fino)

Nova stelo sur esperanta ĉielo

-- el Esperanta Retradio

La Esperanta kulturo havas kuriozajn trajtojn. Unu el tiuj estas la rolo de revuoj en ĝia historio.

Oni povas diri, ke ili estas esenca parto de la lingva animo. Ekde la unuaj jaroj de ĝia ekzistado, publikiĝis periodaĵoj, kiuj funkciis ne nur kiel kunigantoj de la unuaj adeptoj de la ideo, sed ankaŭ kiel lingva modelo por ĉiutaga uzado. Ili restis kiel respektindaj, amataj relikvoj de la lingvoorigino.

taskon daŭrigi la aferon kaj tiel aperis en Svedujo "Lingvo Internacia", regule eldonita inter 1895 kaj 1914. En la jaro 1906 ekaperis "La Revuo", en Francujo, kaj ankaŭ ĉi tiu eldoniĝis ĝis 1914. Alia epokfara kulturperiodaĵo estis "Nica Literatura Revuo", inter 1955 kaj 1962.



La listo estas longa kaj ne eblas elĉerpi ĝin. Mi memoras, ke kiam mi estis juna, freŝbakita Esperantisto, mi sukcesis legi disajn ekzemplerojn de la bela "La Praktiko", kiu enhavis fotojn, raportojn pri movadaj eventoj, prozaĵojn, poemojn, krucvortenginojn, kaj anekdotojn, en tre agrabla maniero. La lingvo vive pulsas en ĝi! La samon oni povas diri pri la mirinda "Heroldo de Esperanto". En pli moderna tempo, la tradicion digne konservis la brazila "Fonto" kaj la franca "La Gazeto", dum multaj jaroj. "La Ondo de Esperanto" estis bela parto de tiu sinsekvo, sed bedaŭrinde ĉesis publikiĝi. Nuntempe, inter

"La Esperantisto" estis la unua revuo en Esperanto. Ĝi estis la unua revuo en Germanujo kaj funkciis en Germanujo kaj funkciis de 1889 ĝis 1895. Juna svedo alprenis la



diversaj aliaj revuoj, tenas la torĉon de nia revuaro la bonegaj "Revuo Esperanto" (de Universala Esperanto-Asocio), "Literatura Foiro" kaj "Beletra Almanako", inter pluraj aliaj. Kaj honoron ni esprimu al la 40-jara "Monato"!

En la komenco de la 21-a jarcento (dua jarcento en la historio de Esperanto), novaĵo okazas: oni pli kaj pli profitas la uzadon de interreto por niaj revuoj. Pluraj bonaj periodaĵoj jam estas facile atingeblaj per ĉi tiu nova maniero, kaj kvankam multaj tradiciemaj legantoj preferas la paperajn versiojn, tamen ili kreskas kaj evoluas, precipe inter la junaj samideanoj.

Antaŭ kvar jaroj ekaperis "Turka Stelo". Estas jam tempo atenti pri ĝi – kaj apogi ĝin. Ĝi estas simpatia, kuraĝa, diligenta kaj obstina laboro. Post tiu komenca tempo, oni jam povas aserti, ke ĝi estas serioza klopodo por enviciĝo en la liston de niaj kulturrevuoj. Sub la redaktado de turka aktivulo Vasil Kadifeli, ĝi estas akurate monata kaj enhavas varian

materialon: poemojn, eseojn, rakontojn, kronikaĵojn, movadajn informojn, eltiraĵojn el aliaj fontoj kaj belajn ilustraĵojn. La grafika aspekto estas tre agrabla. La redaktoro klare esprimas sian decidon eviti en ĝi tekstojn pri politiko. Laŭ mia gusto, unu el la plej interesaj kaj klerigaj rubrikoj temas pri la greka mitologio, pri kiu ĉiunumere bele verkas la greko Spiros Sarafian. Ŝajnas al mi, ke ĉiu numero de ĉi tiu revuo (kiun la redaktoro modeste nomas "revueto") estas riĉa materialo por veteranoj kaj komencantoj. Ĝi jam estas abonata de centoj da Esperantistoj tra la mondo. Kaj jen alloga detalo: ĝi estas senpaga!

Bonvenon al la Turka Stelo! Longan lumadon al ĝi!

verkis **Paŭlo Sergio Viana** el Brazilo
15/01/2020

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.com/2020/01/nova-stelo-sur-esperanta-cielo.html?m=1>

15>> Tigran Mansurjan parolas pri la tempo, kiam li unue renkontiĝis kun li: "Sur la scenejo li rakontis pri la filmo li intencis fari per viglaj man-movoj. Lia parolo, kiu ne havis specifan logikon aŭ temon, ŝajnis al krudaj bildoj de momentaj sekcioj, kiujn oni muntus kaj kunigus. Lia parolo ĝenerale estis konfuziga: Li saltis de ideo al ideo, kaj ofte ili ne havis iun ajn ligon, sed ĉiuj de ili rakontis pri iu stranga mondo, kaj kian impreson oni havus renkontiĝi kun tiu fenomeno, nomata Parajanov. La scenejo estis plenplena je strangaĵoj kaj originalaĵoj. Ĉi tiu unupersona spektaklo, tute ne estis malpli interesa ol la farota filmo 'Koloro de Granatoj.'"

Bonan spektaklon scivolema spektantaro! Via intuicio kaj la poeziaj figuraĵoj gvidu vin pli ol via logiko!... Mi nur tiom sukcesis rakonti al vi tiujn filmojn pro la limoj de lingvo. Aŭ mi eble ebriiĝis pro tiom da figuraĵoj kaj diris sensencaĵojn.

¹ *edebiyathaber.net, Riza Oylum*

² *Radvanji, 2019*

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
Buyukada, Istanbulo
20 majo 2020

Ekde la naŭa (Απ' τες εννιά)

tradukis Vasil Kadifeli el Turkio



"Απ' τες εννιά", poemo de greka poeto Konstantinos Kavafis el Aleksandrio Egiptio (1863 – 1933)

Dudeka kaj duono. Rapide pasis la horo ekde la naŭa, kiam mi ŝaltis la lampon, kaj mi eksidis ĉi tie. Mi sidis sen legadi, kaj sen paroladi. Kun kiu mi parolu estante tiom sola en ĉi tiu domo.

La idolo de mia nova korpo, ekde la naŭa, kiam mi ŝaltis la lampon,

venis kaj trovis min kaj al mi rememorigis fermitajn ĉambrojn aromigitajn, kaj pasintan volupton – kia aŭdaca volupto! Kaj ĝi ankaŭ alportis al antaŭ la miajn okulojn, vojojn, kiuj nun fariĝis nereconeblaj, placojn plenajn je moviĝo, kiuj kvietiĝis, kaj teatrejojn kaj kafejojn, kie vi estis iam.

La idolo de mia nova korpo venis kaj al mi alportis la malĝojajn funebrojn de mia familio, disigojn, sentojn de miaj proksimuloj, sentojn de la forpasintoj tiom malmulte taksataj.

Dudeka kaj duono. Kiel pasis la horo. Dudeka kaj duono. Kiel pasis la jaroj.



tradukis Vasil Kadifeli el Turkio

Vortoj de Marjorie Boulton

Esperanto signifas por mi...

Por mi Esperanto signifas lingvon, kiu povas iom helpi al amikeco inter diversaj nacioj kaj tiel al tiu paco, kiun ni ĉiuj deziras.

Esperanto signifas lingvon, kiu jam havas propran riĉan literaturon kaj kiu peras kulturojn de popoloj al popoloj. Esperanto signifas lingvon, kiu – detruante la lingvajn barilojn – ankaŭ povos ŝpari por la homaro multan monon, kiun oni do povus disponigi alimaniere, ekzemple por hospitaloj, lernejoj, teatroj, muzeoj, sportejoj, parkoj...

Sed Esperanto signifas tion kaj tion kaj ankaŭ tion al ĉiuj inteligentaj homoj, kiuj scias pri ĝi, kiuj lernis ĝin. Al mi Esperanto signifas ankaŭ lingvon, per kiu mi trovis multajn tre karajn geamikojn, kun kiuj mi povas paroli pli libere kaj pli nature ol kun multaj britoj. Dum vojaĝoj en diversaj Eŭropaj landoj kaj en Usono mi trovis multajn varmajn korojn kaj gastamajn hejmojn inter esperantistoj. Pere de Esperanto mi vidis multon en la mondo, kion alimaniere mi ne povus vidi, ekster la kadro de nura turismo mi vidis familiajn vivo-stilojn, malantaŭ propagandaj fasadoj mi vidis partojn de la reala vivo, super la mitoj kaj superstiĉoj pri raso kaj nacio mi trovis korojn de homoj en multaj landoj.

Tamen, por mi persone plej grava estis mia stranga vivo kiel poeto en Esperanto, mi trovis novan poetan personecon, pli kuraĝan, pli sinceran kaj eble pli profundan, ol mi trovis antaŭe, en la angla. Tiel Esperanto, iasence, donis al mi – dum kriza sezono en mia interna vivo – mian propran animon.

Vortoj de Antanas Grincevičius

el Litova Stelo 4 (134) / 2000.

Iam ne-esperantistoj demandas, kiom al mi donas Esperanto? Ĉu mi havas ian profiton? Esperanto ne alportis al mi ajnan materialan riĉaĵon, tamen ĝi influis mian spiritan mondon. Esperanto ne estas ordinara lingvo. Ĝi detruas murojn ne nur inter popoloj, sed tiujn ankaŭ en niaj koroj, en nia pensado. Se danke al Esperanto mi fariĝis almenaŭ iomete pli tolerema al homoj de aliaj nacieco, religio, raso, ĉu tio estas malmulte kaj senvalore? Mi kredas, ke almenaŭ pro tio mia longdaŭra reveno al nia lingvo ne estas sensenca.

Vortoj de Edmund Privat „Pri Esperanta literaturo“ 1912.



Esperanto ne estas propono: ĝi estas fakto!

Esperanton ni neniam konsideru kiel proponatan aferon. Ĉesu tiaj paroloj, kiaj „se Esperanto sukcesos...“ aŭ „kiam Esperanto estos starigita...“

Jam sukcesis Esperanto, ĉar ĝi vivas, jam ĝi estas starigita, ĉar ĝi uziĝas.

Ni ĉesu proponi, ĉar proponante oni ne facile konvinkas.

Ni agu pli kaj pli, ni uzu la lingvon ĉiumaniere. Ni florigu kaj kreskigu nian rondon, kvazaŭ modelon por tuta mondo.

Ne propagandu per petegoj al la homoj, ke ili bonvolu lerni Esperanton. Ofte ni lasu la homojn kaj mem laboradu en nia mondeto, uzante Esperanton kaj kiam ni turnas nin al publiko, tiam ni estu modestaj, sed iom fieraj kaj ne faru petegojn, sed simple – kaj sengrandige – ni montru, kiel bone funkciadas Esperanto, kiel bele ĝi vivas (... ..)

Eĉ ne timu komprenigi al homoj, ke ilin Esperanto tute ne bezonas, ĉar sen ili ĝi jam tre bone sukcesis.

Vortoj de Valo

Unua novembro

Floroj, multaj floroj. Belegaj krizantemoj, kaj aliaj. Ĉe la piedo de la muroj de tombejo, aŭtoj en longaj vicoj. Homoj gravmienaj, riĉaj kaj malriĉaj, portas bukedojn aŭ florpotojn. La kulto al kadavro, verve primokita de nia kormemora Lanti, konservas siajn fidelulojn.

La florvendistoj afiŝis: „Donacu florojn al tiuj, kiuj ne plu estas“. Traduko: al tiuj, kiuj ne havas okulojn por ilin vidi nek nazon por ilin flari. Tiuj honorindaj komercistoj, cetere, estas simpatiaj, same kiel la kultivistoj de florigardenoj, artaj laboristoj. Ili meritas vivi per sia laboro. Ni do aĉetu florojn – sed por ilin donaci al vivantoj, vid- kaj flar-kapablaj, kiuj scipovas ilin apreci.

Mi neniam iras al tomboj de miaj gepatroj, geavoj, geonkloj, de mia kuzo mortigita ĉe Verduno, de mia juna kuzino viktimo de aŭtoakcidento, de miaj (multaj) forpasintaj geamikoj – sed pri ĉiuj mi fidele gardas la memoron. Mi deziras, ke miaj amatoj same

>>31